

MALGRANDA REVUO

aperas kvaronjare. Prezo 1 kr (inkl. sendkoston), je mendo de minimume 10 ekz. po 0,80 kr. Abono akceptata. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 int. respondekuponoj. Nroj 1/43 kaj 2, 3, 4/44 vendataj por po 0,55 kr. — Stellan Engholm, Skolgatan 9, Ludvika, Svedujo. Poŝtokonto 26 80 23.

PREZO: 1:- Kr.



MALGRANDA

REVUO

N:RO 4

1946

4-a JARO

ENHAVO:

	Paĝo
FANTAZIO PRI POTENCOFRENEZO de Olof Lagercrantz	1
KVAR POEMOJ de L. C. Deij	6
HOMO KAJ HOMEKO de Dro A. Mildwurf	8
DIFEKTITA PONTO de Wles Steffering	13
KLERULOJ DISPUTAS de F. R. Banham	16
RELIGIA SENTO de G. J. Degenkamp	20
LARS EN SKOGSMADEN de August Bondeson	25
KOMENTOJ	38
LITERATURO	44

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO

Fantazio pri Potencofrenezo

De OLOF LAGERCRANTZ

La aŭtoro estas svedo, poeto kaj prozisto, kritikisto.

Iun posttagmezon dum la milito mi venis biciklante sur dezerta stokholma strato. Ial malfiksiĝis unu el la ŝraŭbingoj sur la antaŭa akso, kaj la rado komencis oblikviĝi. Je tio estiĝis fajfa, rapide altiĝanta tono. Mirante mi rimarkis, kiel la akra, furioze altiĝanta tono post unu sekundo resonas en la tuta strato. En la posta momento ĝi estis jetata trans la tegmentojn kaj estis aŭdebla multajn kilometrojn malproksime. Ĝi estis akirinta penetran forton, kiu teruris min.

Mi sentis min ekster la klaraj kaj raciaj naturleĝoj, kiuj ĉirkaŭbaras la homan vivon. Ŝajnis al mi, ke mi enkuras tute novan mondon, kie estas renversita ĉio, kion mi antaŭe lernis kaj pensis. Se la antaŭa rado de mia biciklo povas estigi tian inferan sonegon, ĉar tiel mi nun devis karakterizi la ĵus nefortan fajfon, aŭ estas mi freneza, aŭ mi kaj mia biciklo posedas neordinarajn, ĝis nun netrovitajn fortojn. Dum momento la tero ŝanceliĝis sub mi. Ĉio daŭris nur kelkajn sekundojn. Rimarkante ke la antaŭa rado oblikvas, mi preskaŭ samtempe deiris la biciklon. Mi staris sur la strato. Blekegis la flugdefendaj sirenoj sur la tegmentoj. Estis lundo kaj la tria horo. La alarmo komenciĝis tuj post la ekgrincado de la

rado, la du sonoj kunfandiĝis, kaj mi ne rimarkis tion. Mi hontis kaj ridis pri mi, sed dum pluraj horoj mi havis senton de fantomtimo.

Koincidis la oblikviĝo de la rado kaj la flugalarmo. Estis neordinare sed ne unike. Ĉiuj homoj faris similajn spertojn kaj dum momento sentis sin tiritaj el la ordinara ekzisto, kiu tamen reprenis la regadon, ĝenerale tiel rapide, ke la menso apenaŭ trovis tempon reagi.

Iam antaŭe mi spertis similan aferon. Mi kuŝis malsana kaj havis febron. Mi estis malpacienca kaj komencis frapadi per fingropinto kontraŭ la tabulon de la nokta tablo. De tiaj fingrofrapoj estiĝas ja nur malfortaj sonoj, sed en la momento, kiam mia fingro unuafoje frapis, eksonis krevigeksplodo ekstere. Sajnis al mi kurioze. Malmulte sufiĉas por distri, kiam oni estas malsana. Mi atendis iomete kaj denove frapetis. Sonis nova eksplodo. Mi sentis, ke mi havas febron, kaj frostektremis. Denove mi frapis, kaj obtuze respondis eksplodo. Mi komencis maltrankviliĝi kaj enĝlitis en duone hipnotan staton, verŝajne parte dependan de la febro. Ŝajnis kvaŭzaŭ mi regus la mondon kaj havus la forton de la fulmotondro en miaj fingropintoj. Ses fojojn en sekvo mi frapis per la fingro, kaj ĉiufoje respondis eksplodo. Sed la sepan fojon estis silente ekstere, kaj nur post kelka tempo venis la krako. La sorĉo estis rompita, kaj mi ridetis pro la kurioza koincido. Ses fingrofrapoj, ses krevigeksplodoj, tio ne okazas ofte. La travivaĵo ne estis sole agrabla. Sed en ĝi estis io loga, iu dolĉa ebriiĝo, kiun mi ankoraŭ memoras. La dolĉo de potencebrio!

Mi demandas min, kio estus okazinta, se iu diableca persono estus sciinta, kion signifas miaj fingrofrapoj, kaj se li estus aranĝinta tiel, ke eksplodo respondus kiam ajn, kiam plaĉus al mi frapeti. Teknike tio estus aranĝebla. Eble mia kapo post kelka tempo konfuziĝus, kaj mi kredus, ke mi posedas superhoman forton, ke la naturleĝoj ne validas por mi, ke mi ne bezonas konsideri iun ajn, ke

mi estas ia dio, supera al la malvasta, peniga kaj iom ridinda ĉiutagaĵo de la homoj.

Eble mi estus vekiginta post kelka tempo kaj kompreninta, ke oni komplotis kontraŭ mi. Mi estus trovinta la elektrajn dratojn de la nokta tablo al la rokrompantoj malsupre en la valo. Sed ankaŭ povas esti, ke la senĉesaj krakoj estus narkotintaj mian racion kaj inertigintaj mian menson. Eble mi ne estus trovinta tempon por ordigi miajn pensojn, kaj post kelka tempo mi estus maturiginta por frenezulejo. Diagnozo: potencefrenezeco.

Mi ne scias, kion diras la psikiatroj pri tiu rezonado. Eble ili respondas, ke sen disponeco al potencefrenezeco neniu estas atakata de tiu malsano, oni provu kiom ajn ruze infekti lin. Verŝajne oni nun forlasis tiun koncepton de pasinta tempo, ofte spegulita en romanoj kaj dramoj el la novromantika tempo, kiam florkronitaj Ofelioj estis laŭmodaj, ke kiu ajn homo povas fariĝi daŭre freneza, se li estas objekto de kontentige fortaj mensaj aŭ korpaj suferoj. Sed ĉe laiko havu rajton permesi al sia fantazio ludi pri la problemo. Per helpo de la bicikla rado kaj la fingrofrapoj oni eble povas trovi klarigon pri la klare rimarkebla konfuzo, kiu en la daŭro kaptis ekzemple Hitler kaj Mussolini, kaj ion similan al tiu konfuzo, kvankam en pli milda formo, oni eble trovas ĉe la pli multaj el la solregantoj kaj politikaj aŭ militaj gvidantoj de nia tempo. Ĉiutage ili vidas, ke ilia plej eta fingrofrapo liberigas grandegajn fortojn, kaj ĉu tio ne devas enigi ilin en ian hipnotan dormon, el kiu ili ne povas vekigi? Ĉu Hitler ne troviĝis en tia dormo, kiam li ne povis kompreni, ke la milito estis perdita, kiam li ĉiam promesis ŝanĝon en la lasta momento, novan armilon, novan genian planon, kiam li sen kaptebla senco permesis, ke lia popolo sangas ĝismorte. Li ja bezonis nur frapi per la fingro, kaj ĉio ŝanĝiĝos. Dum jaroj li vidis, ke mirigaj entreprenoj komenciĝas kaj sukcesas, se li nur gestas per la mano. La moderna tekniko en la manoj de servemaj flatuloj estis servopreta kun ĉiam nova hipnota narkotaĵo. Jen venas la milito kaj post kelkaj jaroj la malvenkoj. Sed kiel

klarigi la reagon de Hitler? Kiel antaŭe li parolis pri la rimarkinda en tio, ke li, simpla soldato, fariĝis gvidanto de grandpotenco. Li parolis pri Versailles, pri la judoj, pri la krucmilitiro. Li estis homo de la sorto kaj havis pruvitan kontakton kun la realco, kiu formiĝis laŭ lia deziro. Malvenkoj neniam estis konfcsataj. Lia fingro frapis, kaj la eksplodo tondris. Nun en la finperiodo de la milito estiĝis ia okaza difekto en la mekanismo. Jen li baldaŭ trovos la sekreton, kaj ne gravas, se dum la lando estas frakasata. Venos la horo, kiam denove ĉio estos en ordo. Fingrofrapo — kaj jen angloj kaj amerikanoj estos ĵetataj en la Kanalon. Ankoraŭ unu frapo, la rusoj neniĝos, kaj la frakasitaj germanaj urboj leviĝos el la ruinoj. Ankoraŭ unu, kaj la mortintoj leviĝos el siaj tomboj, pacokolomboj kveros ĉirkaŭ la trono de la mondreganto.

Antaŭ multaj jaroj mi legis libron de Chesterton: "La poeto kaj la idiotoj". En ĝi estas homo, kiun kaptas potencofrenezo. Komenciĝas tiel, ke plurfoje sinsekve okazas, ke el suna vetero fariĝas pluva en la sama momento kiam li alvenas al festeno. La gastoj ŝerce diras, ke li ĉiam kunportas malbonan veteron. Tio estas ja dirmaniero kaj en Anglujo kaj ĉe ni. Sed la viro konsideras tion serioza afero kaj kredas, ke ekzistas sekreta rilato inter li kaj la veteraj potencoj kaj ke li povas influ al ili. Tiu penso detruas lian psikan sanon. Jen intervenas la poeto de la libro. Li armas sin per ĵetŝnuro kaj iun elektropezan posttagmezon li kaptas la frenezulon kaj ligas lin ĉe arbo. Tie li devas stari, dum la fulmoj ĵetiĝas ĉirkaŭ li. Li kredis, ke li ordonas la pluvon, sed nun ĝi vipas lian vizaĝon kaj trapenstras liajn vestojn. La viro plene resaniĝas kaj kortuŝita premas la manon de sia bonfaranto.

Mi ne memoras, ĉu troviĝis en la rakonto de Chesterton iu duonkaŝita politika satiro. Sed la kuraco uzita de la poeto certe estas rekomendinda kontraŭ politikistoj, kiuj komencas konduki tro grandgeste. La angla konstitucio ja garantias, ke en la politika vivo ĉiam troviĝas tiaj kura-

copovaj poetoj. Antaŭ nelonge Churchill ricevis siajn ĵetŝnuron, fulmojn kaj pluvon.

Ju pli evoluas la teknika civilizo, ju pli ofte la regantaj homoj povas uzi rimedojn ne uzeblajn de la ordinara civitano, ju pli grandaj fariĝas la efikoj de ordono de militgvidanto, ju pli grandan mekanikan frapforton akiras la radiportata voĉo de politika parolanto, des pli grandiĝas la risko, ke ŝtelatakos ilin la terura dormo de la hipnota potencofrenezo.

El vidpunkto de la personeco fariĝas per ĉiu jaro pli kaj pli danĝere esti elektita gvidanto de popolo, ĉar la potenco, pri kiu disponas tia gvidanto, tiel ege diferencigas lin de ordinara homoj, ke li devas havi tre fortan karakteron por povi kontraŭstari la voĉojn, kiuj volas kredi al li, ke la potencorimedoj en liaj manoj havas sian originon en li mem. Estas la flugisto, ne la flugmaŝino, kiu sentas la ravon de la alteco. Estas la kanonoficiro, ne la kanono, kiu sentas la sorĉon de la forto. La moderna civilizo portas en sia propra sino diktatoran revon, potencofrezezon. La moderna tekniko en pli alta grado ol iam antaŭe apartigas la gvidantojn for de la popolo, kaj tial ĉiu nova invento estas minaco ne nur kontraŭ mensa sano de diktatoro sed ankaŭ kontraŭ tia socio, kies gvidantoj estas elektitaj laŭ demokrataj principoj. Por ke la demokratio povu pluvivi, ĝi devas por ĉiu jaro pli kaj pli fervore kaj celkonscie streĉi siajn fortojn, ĉar la tempo mem estas ĝia malamiko. La bezono de kritiko, precipe kontraŭ la regantoj, per ĉiu jaro pligrandiĝas en la moderna socio. La preslibereco estas en tiu ĉi jarcento duoble kaj multoble pli necesa ol antaŭe. La hipnota potencodormo faras pli kaj pli danĝerajn atakojn kontraŭ tiuj, kiujn la popolo elektas aŭ akceptas kiel siajn gvidantojn.

Al tiuj pensoj kondukis min la bicikla rado kaj la fingrofrapo.

El la sveda de *S. Engholm*

Kvar poemoj

De L. C. DEIJ

Vane

Sur arbara muskorando
morgaŭ sonos la komando:
Feuer!^{*}
Dekdu pafos kaj mi mortos...
Dekdu trafos! Ĉu mi fortos
sur arbara muskorando?
Feuer!
morgaŭ sonos la komando.

Sub folia branĉaltaro
morgaŭ krios la barbaro:
Feuer!
Dekdu fulmoj — plumbovomo!
Flustros ulmoj — Ecce Homo
sub folia branĉaltaro!
Feuer!
morgaŭ krios la barbaro...

Kapon alte en mateno!
Morgaŭ krudos la malbeno:
Feuer!
Dekdu sklavas; mi — libera!
Mort' ne gravas, se fiera
kapon alte en mateno...
Feuer!
vane krudos la malbeno!

Forveturo

Balanciĝante laŭ la ondopelo
la pruo batas blankan paston,
kaj ne perdinte sian ĉaston
petole amindumas stel' al stelo.

Elspionante super volba velo
desegnas luno longan maston
sur ŝaŭme verdan marovaston
kaj fosforumas flave tra l' malhelo.

* Fojer (fajron! — (germana pafa komandvorto).

Formorte raŭkas lasta mevoĝrako...
Saluton! kota kontinento,
bordeloj, brando kaj volupta sento.

Sufiĉas mia pipo kun tabako,
vidveca dormo sur la pajlosako
sur pura mar' sub blua firmamento!

La tajdo

La mar', la pura maro fluas kaj defluas
el suna sudo for al neĝa nordo,
sur flava sablo kaj en roka fjordo
eterne maro inter la polusoj bruas.

Dum hom' atakas homojn, urbojn fordetruas,
kun ondo plaŭdas ondo en konkordo
de fora strando al proksima bordo,
denove for al horizontoj, kiuj bluas.

Dum milmil jaroj milmil vagaj ventoj
la maron puŝis inter kontinentoj,
de golf' al golfo kuris ondfalango;
sur flava sablo ruĝas homa sango,
post roka fjordo falas bomblavango —
kaj mar' malflugas for kun naŭzaj sentoj...

Epitafo

Apenaŭ matenas, vespero jam venas,
kaj morgaŭ fariĝas hodiaŭ.
Printempo — somero — jam frosta vetero;
la jaro forflugis — adiaŭ!

Sufero — plezuro; finiĝis la kuro,
la ostoj ensaltis la puton.
Post vivo sur tero — ĉiel' aŭ infero?
Ne grave! Mi mortis — Saluton!

Homo kaj homeco De Dro A. MILDWURF

La disrompo de tradiciaj valoroj fariĝis tute evidenta en la postmilita tempo. La tuta vivo fariĝis problema kaj ankaŭ la pozicio de la homo en la mondo. Ankoraŭ pli: la homeco mem, la homeco kiel esenca homa trajto perdis respekton. Pro la kruelaĵoj dum la milito, apenaŭ kredeblaj, oni ofte renkontis la frazojn "Oni eraras pri homeco" aŭ "Oni emas malesperi pri homeco". Ĉe tiuj, kiuj ankoraŭ havas vivseriozon, senton por la homa vivo kiel problemo, la kredo pri homeco estis profunde skuata. Se la homa naturo estas esence neŝanĝebla, nebonigebla, se ĉiam ripetiĝas nur la samaj aferoj kvankam en aliaj formoj — ĉu tiuokaze ne estas vana la penado por plialtigo kaj nobligo de la homoj?

Ĉe multaj la pesimismo estas tiel granda, ke ili kredas vidi la finon de la eŭropa kulturo, eĉ proksiman finon de la homa gento.

Aliaj pensas, ke oni kontentiĝu pri la homa naturo, kia ĝi estas. Oni ne postulu de ĝi ion tre altan, ion, kion ĝi ne povas produkti. Per tia rigardmaniero oni facile forigus la malkontenton pri la homa stato, kaj la homoj povus sen hipokrito vivi laŭ "sia vera naturo".

Sed tiel ĝeneralan difinon kiel "la vera naturo de la homo" ni ne povas akcepti. Ĝenerala diro pri la homaro estas ĉiam nesufiĉa, eĉ se oni ne konsideras la seksojn. Pli granda ol la seksa diferenco estas la diferencoj de popoloj, plej granda tiu de la individuoj. Ekzistas multaj transiraj formoj de la simpla momentohomo, kiu konas nur ĝuocelojn en la vivo, ĝis tiuj tipoj, kiuj ĝis memfero servas al siaj idealoj. Jes, inter la plej malaltaj kaj la plej supraj ŝtupoj de la homaro apenaŭ ekzistas komunaj esencaj trajtoj krom la fiziologiaj.

Kant dividis doktrinon pri la kono de la homo en fiziologian kaj pragmatikan partojn. La fiziologia esploras tion, kion la naturo faras el al homo, la pragmatika tion, kion la homo mem faras aŭ povas kaj devas fari.

Pri la homa gento ekzistas konceptoj malnova kaj moderna, religia kaj naturscienca. La religia koncepto en Eŭropo, elirinta de la juda kreorakonto, vidis en la homo kreaĵon principe diferencon de la bestoj, bildon de Dio, dum la naturscienca koncepto donas al li nur rangon de mambesto, devenanta de simio aŭ de formo inter simio kaj homo.

Por la kulturhomo la malaltigo de diobildo al nepo de simio estis granda bato, kiu komence vekis ŝtormon de indigno. La plej malaltaj homaj triboj staras vere proksime al besteco ankaŭ en sia memkonscio, ekzemple negroj de la plej malalta nivelo rigardas la simion kiel pli altan estaĵon. Aliaj naturpopoloj, ekzemple malajoj, kredas je direkta deveno de ĝi. En la malnovaj kulturoj aperas bestoj kiel dioj, tiel eĉ la egiptoj, ĉe kiuj apud la sankta virbovo granda nombro da malpli gravaj bestoj kiel dioj havis lokon super la homo. Io de tia kulto estas rimarkbla ankaŭ eĉ la grekoj, en kies mitologio Zeŭs okaze en siaj amaventuroj prenas formon de besto. Eĉ en nuntempo tiel alte staranta kulturpopolo kiel la bramanaj hindoj preĝas al la ŝtona virbova koloso en Mysore.

Homo estas al homo malamiko. Laŭ la penso de primitivaj popoloj estas veraj homoj nur en la propra gento. Fremduloj estas io eksterhoma, demona, malutila, kion oni devas mortigi aŭ teni en distanco. Similan koncepton ni renkontas ankaŭ sur altaj kulturŝtupoj. Por greko negreko estis barbaro. Ke la moderna nacia ŝovinismo uzas similajn konceptojn, estas sufiĉe konate. Ĉiu diferenco de la propra genta tipo estas konsiderata kiel signo de malplivaloro, kiel io malagraba, malestiminda, kvazaŭ la homa gento trovas sian efektivigon nur en aparta gento.

Malamika sinteno al samspeculoj kaj inklini al kruelo faras el la homo la plej malbonan beston de la tero. Voltaire nomis la homon tigrosimio. Fakte la homo pro sia instinkto de detruo al samspeculoj superas en kruelo ĉiujn aliajn bestojn. La instinkto de mortigo estas sortograva. La historion de la homaro oni povus preskaŭ nomi historio de mortigado — en leĝa formo de homofero, mortpuno,

milito, en neleĝa formo de krimoj pro pasio, avido, venĝemo. Mortigo estas rimedo de popoloj, klasoj, seksoj, instrumento por sekurigi potencon, batalilo de subpremitoj, emblemo de revolucio. Mortigo ludas en teatroj, krias el la epopeoj, servas en formo de duelo al la persona honoro, en formo de politika atenco al la libero, en formo de milito al heroeco.

Oni povas kontraŭdiri, ke sangavido ne estas ĝenerala eco de la homaro. Inter la tiel nomataj naturpopoloj troviĝas pacemaj. Inter la kulturpopoloj la hinda tre simpatie diferencas de la eŭropaj pro sia respekto al la vivrajtoj de ĉiuj aliaj estaĵoj.

Sed al la naturo de la homoj apartenas ankaŭ kunsento, boneco, grandanimeco, sinoferemo, trajtoj, kiuj anoncas penadon por memsubigo, perfektigo, plialtigo. Kvankam neoftaj ankaŭ tiuj kvalitoj estas homaj. Homo estas ne nur instinkta kaj sciema. Jam en la instinktoj interbatalas kontraŭaj impulsoj, kiujn ni konsideras malaltaj aŭ altaj.

Moralon oni provas derivi el diversaj kaŭzoj. Por biologie klarigi la kontraŭecon en la homa naturo, oni parolas pri instinktoj de bestoj rabaj kaj nerabaj. Ĉie oni vidas, ke la fortulo ekspluatas la malfortunon, en publikaj rilatoj kaj en privataj. Ankaŭ en la individuo batalas kontraŭaj fortoj, egoismo kaj altruismo. La moralo, kiun la rabobestoj ne konas, estus do produkto de la nerabaj bestoj, kiuj distingas bonon de malbono. Apud tiu koncepto troviĝas alia, laŭ kiu moralo devenas de utileco. Herbert Spencer egaligas la esprimon "bona" kun "utila" aŭ "laŭcela", kun rilato al la komuneco. Nietzsche kontraŭe asertas, ke ne amo al la proksimulo sed timo pro li estas la kaŭzo de moralo. Konata estas ankaŭ la koncepto de Schopenhauer, kiu konsideras la kunsuferon kiel fandan principon de moralo kaj interpretas ĝin laŭ hinda instruo kiel scion pri la spirita unueco de ĉiu vivo.

Schopenhauer identigas moralon kaj homecon. Sed efektive ekzistas diferenco inter moralo kaj homeco. Moralo montras sistemon de ordonoj, sed obeo sub kon-

diĉoj ne estas la sama afero kiel homeco. Ĉie, kie moralo pro tradicio postulas senkondiĉan aŭtoritaton, aperas konfliktoj inter la regantaj moralaj konceptoj kaj la deziro de homeco — ekzemple burĝa moralo rilate al ekstercedzececa patrineco.

En la nuno la homeco troviĝas sur tre malalta nivelo. Kvankam ĝi kiel postulo de homamo jam havas aĝon de jarmiloj, ĝi en la grandaj malpacoj ne atingis voĉdonan rajton. Kiu volus starigi ĝin en la unuan vicon, tiu ŝajnus ridinde mondfremda. La moderna vivado ne akcelas evoluon de homeco. En la ĝenerala mekanikiĝo, kiu etendiĝas al pli kaj pli da kampoj, la individuo devas cedi al unuflanka evoluo de siaj spirita kaj korpaj fortoj. Sekvo de tio estas spirita malriĉiĝo kaj platiĝo. Tiel malriĉiĝas ankaŭ homa kunvivo laŭ postuloj de homeco. Se ni volas serĉi homecon en la moderna vivo, ni devas serĉi ĝin sub aliaj nomoj kaj formoj.

Laŭ Fichte la 19a jarcento pro la evoludoktrino estas ĉefperiodo en la homa historio. Sed ankaŭ en alia direkto aperis nova eblo por progreso: la teknika naturregado. Kun ĝi venas ŝanĝoj en la eksteraj vivkondiĉoj. Tiel granda estas la influo de la teknika vivperfektigo, ke multaj atendas de tiu progreso liberigon de la plej pezaj malbonoj, kiuj premas la homaron. La tekniko fakte kreas novajn eblojn por ekzisto, al kiuj la homoj adaptiĝas. Jam tiel ili aliĝas.

Sed kiom ajn granda estus la influo de la teknika evoluo, ĝi sen ideala direkto ne ŝanĝus esence la homan komunvicon. La fortula ekspluato de la malfortunulo, tiu trajto de primitiva komunvivo, ne malaperas pro maŝinoj. Sed la organizado, kiu el la proletaro faras estonte potencon klason, estas unu el la novaj formoj de homeco. Paul Göhre konsideras la solidarecon, kiu regas en la moderna proletaro, kiel la plej altan formon de homeco. Li konsideras humanecon en tiu formo pli alta ol homamo. Homamo estas nur okaze ekzercata, sed la solidareco efektive universale. "Ekzercata de la tuta moderna homaro", diras Göhre, "ĝi atingos perfektion". Kompreneble tio povos

okazi, nur kiam klasaj kontraŭecoj ne plu limigos ĝin. Karl Marx vidis la plej altan valoron en la celado de la laborista movado. Li diris: "Oni devas koni la studadon, la moralan energion, la senripozan evoluinstinkton de la francaj... kaj anglaj laboristoj, por povi imagi la homan nobelecon de tiu movado."

La 19a jarcento estas nova periodo en la homa evoluo pro apero de la organizitaj sociaj movadoj. En la 20a venas klopodo, kiu meritas specialan atenton. Estas la pacismo, kiu organize kaj science turnas sin kontraŭ la amasmortigo, la milito. Sen la principoj de pacismo revolucioj kaj renversoj ne liberigos la homaron de ĝia plej malbona kaj terura heredaĵo, aperanta en formo de milito sed ankaŭ en multaj aliaj formoj. Pacismo defendas pli altan homecon kontraŭ la restaĵoj de barbareco en la kultura vivo. La kulturo forigis homoferadon, kaj same certe ĝi intencas forigi la mortpunon kaj ankaŭ amasmortigadon en formo de milito.

Tiuj havas falsan koncepton, kiuj vidas en la milita ideologio gloron de heroeco kaj timas, ke pacismo subpremos la heroan inklinton. Heroeco restos sed ricevos novan enhavon. Anstataŭ milita heroeco estos heroeco de vivsavo. Riski propran vivon por savi alian signifas pli, ol riski ĝin por detruiri alian. Ne diru, ke tio estas moderna sentimentaleco! Tiu koncepto estis propraĵo de la plej noblaj inter la eŭropaj kulturaj popoloj. La greka heroo ne estis militanta mortigisto. Thesevs kaj Persevs batalas kiel savantoj kontraŭ la monstro, kaj ĉiuj agoj de Herakles, la nacia heroo de la grekoj, koncernas kulturajn motivojn. Jam en la homera tempo ŝanĝiĝas la milita heroidealo en alian. "La suferanta Odyssevs" en la epopeo, kiu portas lian nomon, staras multe pli alte ol la sama viro en la Iliado, la eltrovinto de militruzaĵoj. La milita heroeco komencas regi kun la romanoj, tiu konkera popolo, kiu pruntis siajn kulturidealojn de la grekoj kaj kiel proprajn ideojn kreis nur ŝtat- kaj militideojn. Antaŭ nelonge oni certigis (Spengler), ke ŝtatoj ekzistas por la militoj.

Funde estas rimarkebla tra la tuta eŭropa historio la idea batalo inter milita kaj sava heroeco. La plej alta reprezentanto de la sava heroeco estas la krucumita Kristo, kiu per sia morto volas savi la homaron. Tamen li ĝis nun ne sukcesis venki la militan ideologion. Kontraŭe militantoj alvokas lin eĉ kiel nacian dion. Sed la ideo, kiu enkorpiĝas en li, aperas ĉiam denove en novaj formoj. Tia formo estas nuntempe nerezisto. Al ĝi apartenas Tolstoj, Gandhi kaj ĝenerale rifuzantoj de militservo.

La ĝismuna potencpolitiko de la ŝtatoj estas terure serioza instruo, ke ĉiuj sur sango kaj fero konstruitaj kreaĵoj portas en si ĝermon de disfalo. Por ke venu nova printempo de popoloj kaj homaro, estas necesa spirita revolucio. La sopiro de spiritaj kulturhomoj en ĉiuj landoj estas, ke la mizero de pasintaj teruraj jaroj frakasu la armilojn kaj ke la homaro rejunigita leviĝu el la mondbrulado.

Se oni parolas pri la progreso en la homara spirito, oni devas menciigi ankaŭ la internaciismon, kiu montriĝis post la milito. La internacia helplaboro post la milito estas homeca agado pli ampleksa ol iam antaŭe.

Por la neperfekto de la pasinto rekompencu nin la penso pri progreso, por ĉiuj ŝajne vanaj klopodoj la penso pri kreanta volo, kiu kunligas la unuopulon kun la tuta.

Difektita ponto

De WIES STEFFERING

Varma aŭtuna suno radias super la frisa pejzaĝo. Nia aŭtomobilo ruliĝas tra freŝe verdaj herbejoj, kiujn nigre-blanke makulas la sanaj bestoj de la fama brutaro. La bicndomoj kaŝiĝas en la rondoj de altaj, venton-forkaptantaj arboj. En ebena senfineco etendiĝas la lando. Peco regas ĉie.

Nia aŭtomobilo zumadas pluen. La pejzaĝo aliĝas. Altegaj ulmoj formas super la vojo gotikajn arkojn; la flavaj-brunaj koloroj en ĉiuj nuancoj, varmigataj de la suno, superas la belecon de pentritaj preĝfenestroj. En la arbaro la suno faras miraklojn per sia lumo sur la trunkoj kaj sur la tero. Fungoj, tiuj strangaj "floroj" de la aŭtuna arbaro — ruĝaj, grizaj, violetaj, brunaj, flavaj, verde-blankaj, eburecaj — ornamas la veluran muskon. Per tiklanta brueto la glandoj falas teren. Kelkaj malfruiĝintaj erikobranĉetoj pale floradas. Sciuro saltetas trans la vojon kaj ludas en la lumomallumo inter la trunkoj. Paco neĝenata.

El la arbaro al la maro. Nia aŭtomobilo balanciĝas sur la alta mardigo. Dekstre, sub la digdeklivo, la malalta lando kun la disaj turpintoj, biendomoj kaj brutaro; maldekstre, sub la deklivo ĝis tiel malproksime kiel la okulo povas vidi: la maro, reflektanta la sunfajrerojn en milobla brilado. Trankvile ripozas fiŝistboato; malklara, je granda distanco, trenŝipo tiras longan vicon da boatoj. Paco senfina.

Ni atingas urbeton. Ĝi sonĝas pri sia glora pasinteco, kiam ĝi estis floranta, komercanta urbo de graveco. Nun ĝi kuŝas forgesita ĉe marborda rando; ĝi estas morta, kiel oni diras. Sed ĝi konservas trezoron en la iama urbodomo, konstruita en la deksepa jarcento. Amasiĝas objektoj el ligno skulptita kaj ligno pentrita; malnova porcelano el malproksimaj landoj, alportita de maristoj; popolkostumoj de ne plu imiteblaj ŝtofoj kaj koloroj; arte prilaboritaj kuproj kaj arĝento; la muroj kovritaj de bluaj-blankaj kabejoj kun bibliaj bildoj; mallaŭte kadenciĝas la voĉo de la gvidistino en la dialekto, kantanta kiel la apuda maro. Nur paco ĉirkaŭ la antikva beleco.

Ni sekvas longan kanalon. Ardeoj en majesta flugado akompanas ĝin. Sur kaj ĉe la akvo en la senbrua medio ĉiaj birdoj de la malalta lando. Vilaĝoj ripozas en la varma aŭtuna suno inter akvo kaj herbejoj. Urboj malgrandaj, sed kun grandaj trezoroj de malnova arĥitekturo Flavigantaj tilioj sur la bordoj de la kanaletoj. Mortin-

taj folioj sur la pavimo. Ardantaj dalioj, varmeruĝaj kaj brunaj krizantemoj kaj modeste violkoloraj asteroj en la korboj de la florcendistoj. Paco kaj kontenteco de la posttagmezo.

Denove ekveturas nia aŭtomobilo, tra trankvila, sub vespera nebulo dormetanta pejzaĝo. Kaj subite: detruita ponto, rubaĵo, kaduka ĉirkaŭaĵo. Rememoro pri la milito. Ĉi tie la kanadanoj, purigante la provincon Frislando de la germanaj militistoj, trovis fortan kontraŭstaron. Ĉu estas eble, ke ĉi tie, en tiu trankvilo, iam knaris la tankoj, siblis la grenadoj? Ŝajnas ofte, ke la milito finiĝis jam antaŭ longa tempo, ke nun estas jam preskaŭ forgesite, ke iam tondris ĉiuvespere tra la aero centoj da flugmaŝinoj de okcidento al oriento; ke eksplodis de tempo al tempo bomboj en kaj ekster la urboj, mortigante homojn kaj detruante domojn; ke la ferumitaj botoj de la germanaj policistoj kaŭzis ektimon en la mallumaj vesperoj kaj noktoj; ke la viroj ĝismezagaĵ sin kaŝis sub la tero aŭ en la kamenoj aŭ kie ajn, kiam okazis t. n. "razzia"; ke la homoj malsataj faris longajn vojaĝojn piede aŭ per kadukaj bicikloj por akiri iom da manĝaĵoj; ke judoj estis forpelataj kaj per gaso mortigataj poste; ke fidelaj patriotoj mortis en koncentrejoj; ke miloj kaj miloj da soldatoj falis sur la batalejoj.

Estas bone, ke de tempo al tempo restoj de detruo rememorigas pri la diabla laboro, kiu okazis nur en proksima pasinteco.

En Genezo, la unua libro de la Biblio, Dio demandas: Adamo, kie estas vi? Adamo, la homo, sin kaŝis pro honto antaŭ Dio. Ankaŭ nuntempe sonas ankoraŭ tiu demando: Homo, kie vi estas? Homo, kion vi faras? Kiel vi formas vian vivon? Kiel vi kondutas kontraŭ viaj homfratoj? Kion vi faras por malhelpi novan mondmiliton? Ĉu vi uzas viajn homajn talentojn de racio kaj koro en la servo al la Paco? Kial vi eltrovas atombombon kaj multe bruas ĉirkaŭ ĝi? Kaj kial vi senbrue, senatente preterpasas jam eltrovitajn verkojn de paco kiel Esperanton?

Kaj kion faras vi, Esperantistoj, per la trezoro de racio kaj amo, kiun vi heredis de iu, kiu tage kaj nokte staris en la servo al la homaro?

Demando urĝa al vi kaj al mi. Ĉu ni ne hontu kaj nin kaŝu?

Ĉu nia entuziasmo por la internacia lingvo povas konvinki aliajn? Ĉu nia fervoro sufiĉas por informi kaj instrui eksterulojn? Ĉu nia amo povas ĉirkaŭi la tutan homaron? Ĉu nia volo estas tia, ke ĝi formetas montojn, se necese? Ĉu nia teniĝo ĉie kaj ĉiam estas daŭra propagando por niaj altaj idealoj?

Vi kaj mi scias profunde en la koro, kiaj estas la mankoj ĉe ni. Sciante la mankojn ni havas devon, la devon, kiu postulas de ni, ke ni agu, por ke neniam plu, almenaŭ ne pro nia kulpo, en pejzaĝo trankvila kaj bela eksonu mokridego de pafdifektita ponto.

Kleruloj disputas

De F. R. BANHAM

Rivalaj taksoj pri granda lingvo

Studema sed neinstruita, sciakirema sed senmetoda, mi jam tra du jardekoj da diletantismo forŝutis la tempon spasme penante gajni plezuran, facilan legokapablon en la lingvo de Molière. Tamen, ankoraŭ mi ne atingis tiun gradon de kompetento, kiu ebligis al mi senti la potencon de Balzac same, kiel mi sentas tiun de la anglo Hardy. Tra la nigraj vitroj de mia malklara percepto, la majstra bildo de L'Année Terrible, ho ve, nur tre milde "teruras" kaj nur malforte ekscitas min. Sennombraj nuancoj, miriadoj da sinonimosubtilaĵoj, nekklaraj aludoj al tio, kion ŝajne nur la francoj komprenas, kombiniĝas

aŭ por limigi mian percepton al konfuze ĝenerala ideo, aŭ por konduki min en erarajn menstradukojn.

Ŝajnas al mi, ke mian longan servadon avare rekompencis al mi tiu reĝidinca idiomo, en kies altarlumo mi tiom ofte paliĝis kapdolare. Ofendiĝinte mi jen turnis min al modesta serĉo, kun celo trovi atestojn de homoj pli benitaj ol mi. Ĝis nun la rezulto estas eĉ pli ĥaosa ol la lingvo mem. Rivarol, en "Disertacio pri la franca lingvo" (1784) rimarkigis, ke "la distinga trajto de la franca lingvo estas ĝia vortordo: subjekto, verbo, objekto — la logika sekvo. Tia ordo favoras racion, ne senton, kiu instinkte metas la objekton kiel unuan. Aliaj lingvoj forlasis la rigidan ordon de la franca kaj permesas inversiojn, ĉar homojn regas sentoj pli ofte ol racio. La franca ankoraŭ restas fidela al la rekta vortordo, ĝia sintakso estas nekoruptebla, el kio rezultas admirinda klareco. Sed sekve la franca estas malpli taŭga por muziko kaj poezio ol kiu ajn alia lingvo, antikva aŭ moderna. Franca prozo, aliflanke, estas nekompareble bona."

Nisard esence subtenas al Rivarol. En sia Historio de la franca literaturo, komparante la leĝecon, kiu regas en la franca, kun la libereco en la angla, li forte asertas, ke liaj samnacionoj "preferas la plenan lumon ol la duonombbron, la klaran koloron ol la duban nuancon. Francoj postulas de ĉiu vorto la valoron de fiksa cifero, kiun ĝi samsence prezentu al ĉies percepto. Racio estas preferata ol imago". Nisard konkludas, "ke la franca havas destinaon ekster la propraj landlimoj. En certa grado male al la naturo de la franca popolo, kiu estas nek severanima, nek spirite konsekvenca, nek mankanta koketecon kaj sinornamemon, la logika simpleco de la lingvo nepre atestas al la vero, ke la franca estas difinita de la Naturo por uzo universala; ĝis nun la francoj servis nur kiel ĝiaj gardantoj. El ĉiuj modernaj lingvoj, ĉu ne vere, la franca plej proksime atingas la idealon de tiu algebreca lingvo, pri kiu revadis pensuloj kiel rimedo por unuigi interkomprene la kulturhomojn de ĉiuj landoj?" Algebreca lingvo? Diable!

Kvankam Lafcadio Hearn bone tradukis el la franca anglan, li foje falis en la nebulecon de malpli akrevidaj kritikoj. En sia "Life and Literature", limigante sin je la Romantikaj Skoloj de Anglujo kaj Francujo, li skribis pri la "pli delikataj (1) kvalitoj de la franca", ĝia "pli perfekta formo". Lia juĝo lasas nin dubantaj pri tio: kiajn kvalitojn, kian formon li volas indiki? Sekvas tion la dogmea linio: "La angla lingvo ne kapablas naski strofojn de tia juveleca belo, kian havas Emaux et Camées de Theophile Gautier."

Prof-o Archibald Strong (2) ne kontraŭdiris tion, sed signife substrekis la *homon* prefere ol la *materialon*, la majstron ol la medion. Parolante pri Baudelaire: "La reĝeca potenco kaj majstra originaleco de l'tekniko ravas precipe tiun manplenon da anglosaksoj, kiuj amas kaj komprenas la francan literaturon kaj rigardas kun simpatia ĝuo la kuraĝajn kaj sukcesajn provojn de longa linio da grandaj plumkreantoj kaj geniuloj elforgi la plej altan poezian formon el la ne tre taŭga ŝtofo de la franca lingvo".

La klara averto de Prof-o Meillet en "La Lingvoj de la Moderna Eŭropo" meritas konsideron de trofacilanimaj studentoj: "Kiu ne fleksebligis sian spiriton per longa gimnastiko, tiu estas malkapabla verki en la franca kun efektiva korekteco esprimi. La franca de duonklara homo ĉe preskaŭ ĉiu frazo ridetigas tiujn, kiuj scias sian lingvon dank' al ĝenerala kulturo de l'spirito kaj studoj pri la ekzakta valoro de la vortoj. Tian scion povas akiri nur homoj de natura sentemeco (3) kulturita tra longaj jaroj per ĉiaj fortoj; tial ĝi estas tre malofte vidata. Plene posedas ĝin malmultaj kandidatoj ĉe en la plej malfacilaj ekzamenoj post longaj studoj. Nur homoj, kiuj ne havas ĉe malgrandan penson pri la malfaciloj, povas sen tremo enskribi en la franca kelke da linioj".

Prof-o W. Murdoch (4): "Mi tre inklinas pensi, ke la franca, kiom koncernas la prononcon, estas la plej malfacile akirebla Eŭropa lingvo por fremdulo".

La aŭtoro de "Brighter French" (Bles: eldonanto London): "La franca estas la plej subtila el ĉiuj lingvoj".

La vortoj de Stefano La Colla (redaktoro de la Enciclop. Ital.) en la esperantokongreso en Milano 1934 ŝajnas trofervoraj al tiuj, kiuj jam luktis kontraŭ la amaso da komplikaj idiotismoj kaj sennombraj artifikoj apartenantaj al "unu el la plej malfacilaj ortografioj en la mondo" (Marta, p. 56). Li skribis: "En la franca lingvo ideo povas esti esprimata nur en klare difinita maniero; ĉiu elemento de la frazo havas sian propran lokon, ĉiu vorto sian propran rolon. El tio venas la kristala klareco de la lingvo". Al mi plaĉus renkontigi lin kun Kanoniko W. Barry (5). Tiu kulturama klerikulo ne havis *tiun* iluzion. Li juĝis: "La Franca gramatiko estas preciza kaj difinita — la vortoj tute ne. Francaj vortoj plej ofte estas pli abstraktaj ol en la angla kaj la germana. Ili havas malpli da koloro kaj cirkonstanca forto, multe malpli da pitoresko, kaj lasas sur la menso impreson skizecan, nefinitecan".

Sed li havis alispecan iluzion, kian mi ne havas. Mi nude asertas, ke *neniu* lingvo havas vortprovizon "precizan kaj difinitan". Eĉ ne tiu trolaŭdata lingvo — la antikva greka. Tion instruos al vi kiu ajn greklingva vortlibro. Ĝis la tago, kiam ni fine disvolviĝos jam en rason de Leibnitzoj aŭ Zamenhofoj, uzantaj perfekte-filozofian aŭ perfekte-sintezitan planlingvon, ni devas konfesi tiun doloran fakton.

Melburno, Aŭstralio, aŭguston 1946.

- (1) pli delikataj: Angle "finer".
- (2) Archibald Strong, nun mortinta. Iama profesoro de la angla lingvo kaj literaturo ĉe la Universitato de Adelaide. Tradukis la antikvan "Beowulf", verkis pri la franca literaturo kaj la Shakespeare-literaturo.
- (3) Fr. finesse.
- (4) Walter Murdoch: Aŭstralia escisto kaj prof-o de la angla lit. Loĝas en Perth, Okc. Aŭstralio.
- (5) William Barry, Romkat, kanoniko de St. Chad's, Birmingham kaj rektoro de St. Peter's Leamington, Anglujo. Mortinta.

Afero, supozeble same aĝa kiom la homaro mem, estas la religio, almenaŭ, se religio oni povas nomi ankaŭ la plej primitivajn ideojn pri spirita potencoj en la universo. Ĉu la primitivaj artesprimoj sur ostoj, eburo kaj roksurfacoj, faritaj de la prahomo en la palcolitiko (aŭrignacio — magdalenio) estas parte konsidereblaj ankaŭ kiel esprimoj de ia religia sento, ni ne povas diri kun certe. Sed tre verŝajna tio estas, ĉar en la historio de la prahomo evidentiĝis, ke li pli kaj pli ĉerpis siajn ideojn por tiaj artesprimoj el sia primitiva koncepto pri la spirita mondo, kvankam tiu koncepto, rezulte de la malalta mensa nivelo de la tiama homo, kredeble estis bazita sur la koncepto pri la mondo reala: la naturo lin ĉirkaŭanta.

La scienco ankoraŭ ne sukcesis fiksi la tempon, en kiu la primitiva estulo, el kiu originis la nuna "homo sapiens", trapasis sian spiritan metamorfozon, fariĝis homo vere pensanta. Ni tamen povas iom imagi, ke la primitivulo, ĵus dotita per prudento, komencis rigardi la ĉirkaŭantan mondon per okuloj miregaj, admiraj kaj ... sciivolaj. La plej ordinaraĵojn li jam povis kompreni; sed ekzistis multego, por kiu lia prudento ne sufiĉis. Ne estas mirige, ke en ĉio, kion li ne komprenis, li vidis iajn miraklojn, rezultojn de ia potenco ekster li mem. Plurajn objektojn li jam mem kapablis fari; kiu do faris la aliajn aferojn, la bestojn, la vegetaĵojn? Tra ĉiuj jarcentoj la homo klopodis trovi solvon de ĉiu problemo; tion, de kio li ne trovis solvon, li emis atribui al spirita potenco. Kaj ju pli malvasta estis lia scio pri la mondokazado, des pli granda estis la tereno por lia spirita imago, des pli fantazia lia koncepto pri la naturo.

La prahomo sin sentis malforta kaj senpova kontraŭ la naturfenomenoj, kontraŭ ĉio, kion li ne komprenis; kaj por firmigi sin li bezonis ian apogon. Tium apogon li trovis en la imago pri nevidebla spirito, reganta la universon. En la kredo pri tia potenco li ĉerpis forton; li petis

ties helpon en okazoj de danĝero. Tiu potenco fariĝis lia gvidanto en la vivo. La sento kaj deziro esti gvidata estas nepre homa. Jam kiam infano la homo sentas sin helpbezona kaj serĉas apogon ĉe gepatroj, pliaguloj, triestro, batalgvidanto. Ne mirige, ke tiu sento de helpbezono ludis gravan rolon en liaj konceptoj pri la naturo, pri ĉio nekomprenebla, pri ĉio, el kio li povis atendi bonon, sed ankaŭ malbonon.

De tiu prahistoria epoko jam forpasis pluraj jarmiloj; kaj la homaro konstante evoluis por fine atingi la nunan kulturalan nivelon. Sed tiom pli mirige estas, ke ankoraŭ nun ekzistas homaj triboj, kies mensa stato nur malmulte diferencas de tiu de la prahomoj. Ankaŭ ĉe ili ni trovas la emon atribui ĉion nekompreneblan al ia spirita potenco. Tio estas religio en sia plej primitiva formo. Preskaŭ senescepte la etnologoj opinias, ke ne ekzistas triboj tute ne konantaj ian specon de religio.

Religio do fontas ne el scio, sed el kredo pri tio, kion oni ne scias; ĝi estas rezulto de serĉado pri la vero, sed rezulto vualita de pensoj fantaziaj, tamen provizore kontentiga, ĉar racia kontentiĝo ne estas trovebla. Kaj tiu fantazio fontas el la homaj sentoj kaj deziroj! La sentoj kaj deziroj ludis tre gravan rolon en la religia vivo, ne nur ĉe primitivaj gentoj, sed same ĉe kulturaj popoloj: sentoj kaj deziroj kreis la imagbildon pri ĉielo, pri postmorta vivo, pri dioj, en kiuj lastaj ofte enkorpiĝis la plej bonaj, sed ankaŭ la plej malbonaj homaj ecoj. Tra la tuta historio la spirita mondo de iu popolo spegulis ĝian vivon realan, surteran, nur kun la diferenco, ke ĝi prezentas la perfektigon de la mondo surtera.

Religio estas grandampleksa ideo; sed esence, ĉar racio ludas en ĝi nur malgrandan rolon, ĝi mem estas ia sento, kaj pro tio same nedisputebla kiel aliaj sentoj, ekzemple seksa amo, politiko, ideoj inter si tre diferencaj, sed egale nedisputeblaj, egale relativaj kaj egale ... ŝanĝiĝemaj laŭ spertoj kaj cirkonstancoj.

Same kiel seksa amo kaj politiko ankaŭ religio esprimiĝas ofte per eksceso, ĉe tiom fortaj, ke ili rekte kont-

raŭas la originajn principojn. La primitivaj religioj havis pro tio krom bonaj ankaŭ siajn malbonajn diojn; la nunaj primitivuloj ankoraŭ kredas pri bonaj kaj malbonaj spiritoj. La evoluintaj religioj, la monoteismaj, konas Dion nur nepre bonan, kontraŭ kiu tamen staras la malbonaj spiritoj, la diabloj. Kaj kiom ajn alta la monoteistoj prezentas al si sian Dion, Li tamen estas iasence homa figuro, kvankam ĝis plej alta grado perfektiginta, ĉar ja laŭ la pli multaj monoteismaj religioj Dio mem kreis la homon laŭ sia propra bildo. Li estas ilia Persona Dio. Kaj la diabloj: ĉu ili ne klare pruviĝas la plej malbonaj estaĵoj laŭ homaj sentoj?

En la primitivaj religioj la ĉi supre aluditaj eksceso povis facile esprimiĝi; klara ideo pri bono kaj malbono ne ekzistis. Tiuj ideoj estis tiutempe pli relativaj ol nun kaj ŝanĝiĝis laŭ neceso, cirkonstancoj kaj sentoj. Sed ankaŭ la kulturaj religioj havis siajn ekscesojn. La "mal-luma" mezepoko estas plena de tiaj eksceso: fanatikaj murdoj, ĉe masakroj, rekte kontraŭ la propraj principoj de amo kaj bono.

Ĉu la nuntempa homo multe evoluis de tiam? Ĉu li spirite levis sin super tia fanatikeco? Tio estas dubinda. Jam ne okazas religiaj proccsoj, mortverdiktoj pro herezo k. s. Sed ĉu tio estas pruvo pri pliboneco de la nuna homo? La sentoj certe ne multe pliboniĝis; ŝanĝiĝis nur la ekstera formo por esprimi ilin. Se la homo povus agi senbride laŭ siaj sentoj, la mondo aspektus ne pli kulturita ol en la mezepoko. Klaran ekzemplon pri tio montris la ĵus pasinta milito, dum kiu la plej abomeindaj homaj sentoj trovis liberan vojon por esprimiĝo.

Oni ne diru, ke tiu milito ne estis milito proreligia, do pro tio nekomparebla kun mezepokaj interbataloj kaj masakroj! Ne multe ŝanĝas la fakto, ĉu milito okazas pro religio, por la patrio, pro politikaj, sociaj aŭ ekonomiaj motivoj: religio, kvankam en sia plej malbona senco, ĉiam ludas en ĝi ian rolon. En la antaŭa mondmilito la inter si kontraŭaj partioj ne hontis, same kiel en la mezepoko, alvoki Dion por helpo kontraŭ la malamiko. Ĉu pli kruda

homigo de la imago pri Dio estas farebla? Kaj la ĵusan militon unuavice preparis la germana popolo, ĉe sub gvidado kaj kun pretekstoj de iu grupo de banditoj, tiucele elpensinta ian praĝermanan religion, el kiu la tuta nacio ĉerpu forton por persisti "ĝis la venko". En la plej malbona senco ankaŭ ĝi estis esprimo de sentoj religiaj, kaj ĝuste pro tio tiom fanatika. Kaj ĉu ne denove forte reliefigis la prahoma sopiro apogi sin al ia gvidanto, se ne spirita, almenaŭ enkorpiĝinta, por fantazibilde firmigi la propran malfortan animon?

Fine la origina homa sento de religio trovas sian praviĝon ĉe en sia antitezo: la ateismo. Ni ne diskutu pri tio, ĉu pura ateismo vere ekzistas; ĉu vere ekzistas homoj, sincere kredantaj pri neekzisto de Dio en kia ajn formo, ĉar la koncepto pri Dio ne estas nepre persona: ankaŭ la panteismo agnoskas ian Dion. Sed ni povas konstati, ke multaj ateistoj klopodas pruvi neekziston de Dio kun same fanatika fervoro, kiom kredantoj klopodas pruvi Lian ekziston. Kaj same kiel ĉe la lastaj ne racio sed religiaj sentoj decidas en iliaj argumentoj, ankaŭ la ateistaj argumentoj fontas pli el sentoj ol el racio. Kaj fanatikeco kiel eksceso de ateismo estas proporcie inversa al fanatikeco religia.

Ankaŭ en la ateismo elmontriĝas la prahoma sento: per siaj argumentoj kontraŭ ekzisto de Dio ĝi kreas al si ian apogon, similan, kvankam inverse religian, kian la tuta homa gento jam de sia genezo serĉadis, ĉu en la mondo reala, ĉu en la mondo spirita. Rimarkinde tamen estas, ke nur malmultaj altspiritaj homoj serĉis kaj vere trovis tian apogon en si mem. Tio memorigas pri ia greka legendo, laŭ kiu la homo mem iam estis la dio. Sed la aliaj dioj, enviantaj la homon, rabis de li lian diecon sed ne sciis kie ĝin kaŝi, "ĉar", ili diris inter si, "kie ajn ni ĝin kaŝos, la homo ĝin certe retrovos". Tiam unu el la dioj, pli sagaca ol la aliaj, proponis kaŝi la homan diecon en la homo mem. "Tie", li aldonis, "la homo ĝin neniam serĉos". Kaj tiel fariĝis. Kaj ankoraŭ la homo ne retrovis sian diecon!

Kvankam la scienco ne povis pruvi la ekziston de Dio, ĝi ankaŭ ne pruvis Lian neekziston. La scienco sin bazas sur spertoj kaj faktoj, sur la racio. Sed, ĉu la sentoj estas senbazaĵoj? Ne, ĉar tra la tuta historio la religio esprimis sin, kiom ajn diversmaniere; tio sufiĉe pravas, ke ĝi havas ian originon. Ne gravas, ke tiun originon la scienco ankoraŭ ne konas. Pri multaj aferoj, kiujn la homoj ankoraŭ en la lastaj jarcentoj konsideris mirakloj, la scienco jam trovis solvon. Kial ĝi ne povu iam same klarigi fenomenojn, kiuj nun ŝajnas neklarigeblaj? Oni ne kredis, ke inter scienco kaj religio ekzistas netransirebla limo! Male, la distanco inter scienco kaj religio iĝas konstante pli kaj pli malgranda!

La fama astronomo Flammarion jam montris la vojon en tiu direkto. Kvankam ankaŭ lia scienca teorio pri la universo, laŭ kiu ankaŭ sur la aliaj planedoj kaj sur la multemultaj planedoj de aliaj sunsistemoj loĝas homaj estuloj, provizore ne estas pruvebla, ĝi tamen ŝajnas el scienca vidpunkto plej akceptebla. Kontentige ĝi solvas la plej subtilajn religiajn sentojn de tiuj homoj, kiuj pro raciaj konceptoj ne trovas plenan kontentigon en la nunaj religiaj sistemoj. Ĝi kreas harmonion inter sentoj kaj racio. Ĝi kontentigas eĉ la homon, kiu en angoro pro sia dubo pri ekzisto aŭ neekzisto de ĉiela potenco, kun Multatuli elĝemas:

"Ĉu estas ver'? Respondu, Patro, se ekzistas Vi, respondu! Infanon Vian lasu ne en dubo, Patro! Ne silentu!

La patro silentadas ... Dio, ho; ho, ne— ekzistas Di'!"

Lars en Skogsmaden

De AUGUST BONDESON

August Bondeson (1854—1906) svedo, kuracisto, verkisto. Verkis popolarakontojn; tiuj estis iam multe legataj pro burleskaĵoj kaj bonhumoro; ili tamen estas ankaŭ tre realismaj, kun profunda analizo de homoj kaj socio. Kolektis dum sia tuta vivo popolajn kantojn, fabelojn, rakontojn. Verkis la plej gravan satiran-humoran romanon en sveda lingvo.

Mi estas naskita tie ĉi en Nordal de malalta deveno, kaj kiam malgranda knabo mi devis foriri por laborakiri mian panon. Post tio mi dekkvin jarojn servis ĉe la sama mastro. Estis en Slättdal, ĉe Anders en Skepperud. Kaj mi apenaŭ memoras, ke mia mastro dum ĉiuj tiuj jaroj diris al mi severan vorton; ĉar mi estis obca kaj diligenta — mian laboron mi progresigis, eĉ se mi devis trabeĉi malmolan rokon. — Nu, tio certe estis mia plej feliĉa tempo, tiam mi ne sciis, kio estas veraj ĉagrenoj — mi iris al la tablo kaj satmanĝis, kiam venis la manĝohoro, kaj kiam mi vespere kuŝiĝis, mi ne bezonis maltrankvili pro la morgaŭa tago. — Sed la salajro estis malalta, mi apenaŭ povis flankenmeti ion por la estonto, kiom ajn mi ŝparis kaj premis la monerojn. La vestoj postulis la plimulton, ĉar ju pli honeste oni klopodas kaj penas, des pli da vestoj oni foruzas. Kaj miaj gepatroj sidis ie en malsatkabano, ilin mi tre volis helpi laŭ mia povo.

En Skepperud servis dum dek jaroj kune kun mi Anna Stina, kiu poste fariĝis mia edzino. Ni longe ŝatis unu la alian, antaŭ ol ni diris eĉ unu vorton pri tio, nek mi nek ŝi. Sed jen ni komencis paroli pri tio, ke ni vivu kune, kaj poste ni ne trankviliĝis, antaŭ ol ni ricevis ion propran. Ni kredis ja, ke ni sukcesos, ni kiel aliaj, ĉar ambaŭ ni estis sanaj kaj fortaj, kaj penadon ni ne timis.

Kiam proksimiĝis kristnasko la lastan vintron, kiam mi estis en Skepperud, mi iun dimanĉan posttagmezon, kiam la mastro kaj mi estis solaj, rakontis al li, kion Anna kaj mi pripensis, kaj mi demandis lin, ĉu li ne

volas lasi al ni terpecon por farmbieneto. Sed li tuj malheliĝis kaj diris, ke farmistojn li ne volas havi. Li ne povas toleri farmistojn, li diris, ĉar kiam servisto edziĝas kaj transprenas farmbieneton, venas tuj malriĉo kaj mizero. — Sed mi diris, ke ni laboros, kiom ajn ni povos, kaj Anna kaj mi, tion ni promosis unu al la alia, kaj tiel ni certe akiros nian panon en farmbieneto same bone kiel en la bieno. — Nu, ŝajnas tiel, sed li konas la aferon — kiam venos la multaj idoj kaj bezonas kaj manĝaĵon kaj vestojn, tiam sufiĉos nek laboro nek helpo de bonaj homoj, tiam ĉiukaze estos mizero, li opiniis.

Estis malfacile aŭskulti tion, kaj mi ne volis kredi lin. — Nun, se mi ne sukcesos ĉe li, mi certe sukcesos ĉe iu alia, mi pensis. Certe ne ĉiuj bienuloj timas farmistojn kiel li, ĉar tiukaze tiaj homoj ne tiom abundus. Nun mi vere entuziasmiĝis, mi nepre havigos farmbieneton, kaj jen mi anoncis forlason venontprintempe, kaj por mi kaj por Anna Stina. Andersa petis, ke mi bone pripensu kaj ne tiel rapidu, sed tion mi ne atentis — mi preskaŭ suspektis, ke li tiel diras, nur ĉar li volas ne perdi nin.

La sekvantan dimanĉon mi foriris kaj demandis ĉe aliaj bienuloj en la paroĥo. Sed neniu volis lasi al mi terpecon. Ŝajnis ke ĉiuj decidis kontraŭagi min.

Tiam mi eksciis, ke Riĉa Björn en Fjälliden forigis de lia farmbieneto Bryngel en Skogsmaden kun edzino kaj ses infanoj, ĉar li ne povis pagi. Kaj kvankam mi sciis, ke Björn estas la plej terura sangosuĉanto trovebla, mi tamen iris al li kaj demandis pri la farmbieneto, ĉar estus granda honto, se mi ne sukcesus havigi loketon en tiu printempo. Ĉiuj homoj sciis, ke ni anoncis forlason de nia servo. — Jes, ĉe Björn mi sukcesis. Mi ricevos la farmbieneton, sed mi devos fari al li kvar taglaborojn semajne, kaj tio estis severa pago por la malgranda terpeco.

Ni iris tien kaj rigardis la lokon. Ĝi kuŝis meze en arbaro sur malnova marĉherbejo. Oni povis kalkuli la stoplojn post la lasta rikolto sur la malsekaj kampetoj, tiel

malgrasaj kaj elsuĉitaj ili estis. La dometo kaj aŭkaŭ la bovinstalo estis preskaŭ falpretaj. Estis grandaj truoj en la tegmento, kaj oni povis meti la manon tra la fendoj en la muroj. Ĉiuj fenestroj estis rompitaĵoj, kaj la kamentubo estis falinta. Sed mi estis kvazaŭ sorĉita, nenio timiĝis min. Atendu nur ĝis mi kaj Anna Stina venos tien ĉi, mi pensis, ni baldaŭ donos formon kaj al tero kaj al domoj — kaj mi preskaŭ vidis, kiel prospera kaj verda staras la greno sur la drenitaj kampoj kaj kiel bele kaj plezure estos en la dometo. Arbaro troviĝis ja ĉiuflanke — ne estis malfacile ripari la domojn. Mi miris pro tio, ke la antaŭaj loĝantoj lasis ilin tiom kadukiĝi. Certe estis ne bonaj homoj, mi pensis, kiuj vere meritis forigon. — Nu, jen Björn skribis kontrakton, kiam ni revenis al lia domo, kaj mi surmetis mian nomsignon.

Jen farite. Kiam mi revenis al Skepperud, Anna Stina estis gaja kaj kontenta pri la afero. Ŝi diris, ke ŝi tute ne malŝatas loĝi en Skogsmaden, ĉar mi estos kun ŝi. Ni tie klopodos, kaj ĉio bone sukcesos, ŝi opiniis.

Je la forlastempo Anna Stina restis en la vilaĝo. Ŝi volis teksti litaĵon kaj aliajn aferojn, kiujn ni bezonos. Sed mi iris al Skogsmaden por ordigi, por ke ni povu ekloĝi tie. — Ni estis aĉetintaj bovinon kaj du ŝafinojn kaj iom da mebloj kaj laboriloj per la moncretoj, kiujn ni sukcesis ŝpari de niaj jarsalajroj.

Kiam mi venis tien, mi komencis forŝiri ĉion, kio estis tro putra.

Tiam venis Björn al mi kaj demandis, kion tio signifas, ke mi malkonstruas la domojn.

— Ho, mi diris, oni ja ne povas loĝi en tia domaĉo. Mi devas iom ripari la domojn, antaŭ ol ni ekloĝos tie ĉi.

— Per kio vi povos ripari ilin? li diris. Mi ne vidas, ke vi havas lignon por meti en la lokojn, kie vi forprenas.

— Ne, tion mi ne havas, mi diris. Sed mi intencis demandi vin, ĉu vi permesos al mi preni kelkajn arbojn en la arbaro, kaj kompanse mi laboros en via bieno.

— Ha, tion vi pensis! li diris kaj malice ridis. Sed se tiel vi pensas, mi konsilas al vi lasi la domojn, kiaj ili estas. Ĉar en mia arbaro vi ne rajtos haki eĉ branĉeton; miaj farmistoj ne kutimiĝu al hakado en mia arbaro. Unu fojon permesite, il ne povas deteni sin de hakado. Sekajn branĉojn vi rajtas kolekti kiel brullignon, tio troviĝas en la kontrakto. Sed se arbon vi hakos, vi konatiĝos kun mi. Tion memoru nun kaj por ĉiam.

Poste li turnis al mi la dorson kaj foriris.

Mi staris tie kvazaŭ najlofiksita. Mi ne povis diri eĉ unu vorton responde. Sed kiam li estis for, tiam alfluis kolero.

— Ho, mi kriis. Ĉu vi kredas, ke nia Sinjoro lasis la arbaron kreski nur por vi, malbenita avarulo! Kial vi ne malpermesas al la pego haki sian neston en la arboj, same kiel vi malpermesas al via malriĉa proksimumo preni arbon por ripari sian aĉan loĝejon. — Sed sciuj, mi diris, ĉar bolis en mi, ke iam venos suno kaj somero, kaj mi havas ruĝan vulpon, kiun mi povos liberigi, kaj ĝi tiros sian voston tra la tuta arbaro.

Sed feliĉe li ne aŭdis min.

Jen mi kapablis fari nenion pli tiun tagon. Mi ĵetis la hakilon en la dometon, surmetis la jakon kaj reiris al la vilaĝo al mia malnova mastro. Sed kiam mi alvenis, mi hontis rakonti tion, kio okazis al mi, kaj mi pretekstis alian kaŭzon de mia vizito. Mi ne rakontis la aferon eĉ al Anna Stina por ne ĉagreni ŝin.

Nu, kiam mi iom trankviliĝis, mi reiris al Skogsmaden, kaj survoje mi kredite aĉetis du dekduojn da tabuloj de la bienulo en Halla. Mi devis havigi transporton por ili kvin kilometrojn tra la arbaro al Skogsmaden. Poste mi rapide riparigis la domon. Mi tegis la angulojn per tabuloj kaj kalfatris la murojn per musko, surmetis novan herbaĵtegmenton kaj masonis novan kamentubon, enmetis novajn planktabulojn, kie la malnovaj estis difektaj, kaj enmetis novajn fenestrojn — kaj ĉio aspektis vere tolerebla.

Jen ni ekloĝis en nia nova hejmo kaj estis feliĉaj, ĉar oni vere sentas sin feliĉa la unuan tempon, kiam oni mem decidas pri si. Cetere ni devis severe penadi, multe pli ol iam dum nia servotempo. Anna Stina laboris kiel viro ĉiun tagon hejme sur la farmtero. Ŝi pioĉis kaj bruligis branĉojn, fosis plantbedojn kaj plantis kaj aranĝis ĉiamaniere. Sed mi devis labori miajn kvar tagojn semajne ĉe Björn, kaj li sciis elpremi el malriĉa kompatindulo, kion li devas havi, li labortenis nin farmistojn ĝis malfrue vespere. Kaj foje mi devis por malalta tagsalajro labori ĉe Björn ankaŭ en liberaj tagoj, ĉar ni nepre devis havi ion per kio vivi en nia arbaro. Tial mi ne povis mem multe labori en la farmbieneto. Sed feliĉe mia najbaro, Johannes en Kasen, helpis min en la printempa laboro, ĉar li havis du tirdresitajn bovinojn. — Kaj ni havis bonan humoron, ni esperis pri la aŭtuno, kiam maturiĝos la rikolto, ĉar ni estis semintaj multe da aveno, kaj ni havis grandan terpomkampon.

Sed la aveno ne multe kapablis en la elsuĉita, malseka tero. Ĝi apenaŭ redonis la semitan kvanton, kaj la kerno estis malforta. Iom da pajlo ni tamen ricevis, kio donis vintran furaĝon al la brutoj, kaj tio estis ja bona afero. La terpomoj estis pli bonaj, ĉar ili kreskis sur la novkulturita tero, kie ni pioĉis kaj bruligis. Kaj krome ni ricevis multe da napoj, kaj ni ne timis la vintron.

En la kristnaska tempo naskiĝis Ola, nia unua filo, kaj ni tre ĝojis pro li. Estas tiel pri la infanoj, ili grandigas kaj niajn ĉagrenojn kaj nian ĝojon.

Pasis kelkaj jaroj. Ni nun havis tri kriulojn en la domo, kaj Anna Stina havis sufiĉe da laboro prizorgante ilin. Ŝi ne povis nun helpi min multe en la prizorgo pri la farmbieneto. Kaj Björn estis severa kiel ĉiam, neniam li trovis sufiĉe da penado por oni. Sed tion oni devis toleradi. Mi havis bonan sanon, kaj tial tamen estis bone. Mi laboris kiel du, kaj la farmtero komencis doni pli bonan rikolton. Mi drenis for la akvon kaj faris sterkostakojn el torfo kaj hakitaĵo de abibranĉetoj kaj el

eriko, kaj mi ĉiel klopodis prosperigi mian malgrandan lokon. Ni ankaŭ kreskigis junbovinon, kiu estis naskontasian unuan idon je kristnasko, kaj mi intencis la venontan printempon tirigi ŝin kun la maljuna bovino — poste mi ne bezonos ĉi tiu bestojn! — Kaj mi ankoraŭ havis bonan esperon, ke mi iam povos diri al mia malnova mastro, ke mi sukcesis pli bone, ol li antaŭdiris.

Sed la Sinjoro haltigas la trokuraĝon. Iun frusomeron la bienulo veturigis ŝlimteron al la bieno, kaj oni venigis min por helpi. Tiam mi malvarmumis, kiam mi staris en la malvarma muskomarĉo kaj ŝargis la ĉarojn, kaj mal-sano kuŝigis min en la liton, kaj tie mi kuŝis du longajn monatojn sen povi zorgi eĉ pri mi mem. Estis severa tempo. Malmulte por manĝi ni havis. Kaj Björn ne sentis kompaton, li postulis siajn taglaborojn, minacis per forigo, se ni ne donos. Ni devis vendi niajn ŝafojn, niajn du belajn ŝafinojn kaj ankaŭ la ŝafidojn por ĉi homojn por la taglaboroj.

Nur kiam la somero longe progresis mi tiom resaniĝis, ke mi povis forlasi la liton kaj prizorgi iujn malgrandaĵojn hejme en la farmbieneto. Tiam mi vidis, ke la tegmentodorsa trunko de la kaduka bovinstalo kurbigis kaj estas rompiĝanta, putrinta de pluvo kaj aĝo. Ne estis eble ripari ĝin, ĉar la tuta trunko estis putra, kaj havigi alian el la bienregiono mi ne kapablis — mi nun havis nenion per kio aĉeti, kaj mi ankaŭ ne sciis, kiel transportigi ĝin hejmen. Tiam penso flugis en mian kapon: "Mi hakos trunkon tie ĉi en la arbaro kaj kaŝe almetos ĝin. Okazu kio ajn!"

Vespere mi ŝteliris en la pinarbaron kaj faligis grandan, sanan arbon. Poste Anna Stina kaj mi kune hakis la trunkon kaj sur ĉaro transportis ĝin hejmen. Ni ŝmiris teron sur la arbostumpon kaj kolektis kaj kunprenis ĉiun spliton kaj ĉiun branĉeton, por ke ne estu videbla eĉ la plej eta postesigno de ni.

En la tagiĝo ni leviĝis kaj kune forprenis la malnovan tegmentodorsan kaj almetis la novan. Kaj tre bone pro-

gresis. Jen Anna Stina iris internen por surmeti la kafopoton, ĉar kompreneble ni volis trinki tason da bona kafe post ĉio, kaj kiam mi estis kovranta la novan tegmentodorsan, mi ridis kvankam sola pri tio, kiel facile estis trompi Björn. Restis nur kelkaj ulnoj — kaj jen mi ekvidis Björn, kiu trans la marĉherbejon trotete venis al mi. Se mi estus havinta pafilon, mi certe estus pafinta lin, tiel mi kolorigis. Ĉu la diablo mem sendis lin tien ĉi, aŭ kial li venis ĝuste nun?

— Aha, nun mi kaptis vin, ŝtelisto! li diris.

Mi tiom kolorigis je tiu vorto, ke mi tute ne sciis, kion mi faras. Mi kaptis la hakilon, glitis malsupren de la tegmento kaj kuris kontraŭ lin, kun la hakilo alte batopreta.

— Diru la vorton ŝtelisto ankoraŭfoje, kaj mi fendos vian kranion, sangosuĉanto! mi kriis.

En la sama momento Anna Stina alkuris kaj disigis nin:

— Ne malfeliĉigu vin, Lars! Ne malfeliĉigu vin!

Mi lasis fali la hakilon — la kolero malfortiĝis, kiam mi vidis la teruron de Anna Stina. Mi tiel ektremis, ke mi apenaŭ povis stari sur miaj propraj piedoj. Dankon al Dio, mi pensis, ke mortigo ne premas mian konsciencon — cetere okazu kio ajn.

Tiam Björn pugnigis la manojn kontraŭ min kaj diris:

— Tio estos al vi kosta afero. Unue vi ŝtelis de mi, kaj poste vi minacis min per hakilo. Ni renkontiĝos en la juĝejo.

Poste li foriris.

Anna Stina postkuris lin kaj petis en la nomo de Dio, ke li ne faru nin malfeliĉaj. Sed li nur forpuŝis ŝin kaj respondis nenion.

Nu, kompreneble fariĝis juĝafero. Li deziris, ke mi estu kondamnata pro minaco per hakilo; sed tio ne sukcesis — ĉar ne troviĝis atestantoj. Alie li certe intencis tiom premi min, ke li povos forigi min de la loko. Sed pro tio, ke mi hakis la arbon en lia arbaro, mi devis punpagi per dudekkvin taleroj.

Kie mi, malriĉa pekulo, prenu tiom da mono — tion mi tute ne sciis. Sed la prokuroro, li sciis, li venis al ni kaj garantiprenis la bovinon, kaj ĝi estis la plej grava, kion ni posedis. Mi kunmordis la dentojn kaj silentis. Sed Anna Stina laŭte ploris. Kie nun havigi guton da lakto al la infanoj, kaj kion ni mem havos aldona al la seka pano? Nun ni estis tute sen espero. La junbovino, kiu restis, donos lakton nur kristnaske, kaj ĝis tiam restos longaj monatoj. Se li almenaŭ estus preninta nur ĝin! — Ni kredis, ke ni iom vericevos de la bovino, ĉar ĝi valoris inter amikoj almenaŭ kvardek talerojn. Sed kion kaptas la ungoj de la prokuroro, tio neniam revenas.

Poste mi dum pluraj tagoj iris hejme kvazaŭ kaptito kaj tute ne sciis, kion mi volas, tiel ĉagrenita mi estis. Sed jen mi surmetis la plej bonajn vestojn kaj iris al la bienregiono, al mia malnova mastro. Tiel montriĝos, ke li pravis, kiam li antaŭdiris al mi malriĉon kaj mizeron. Sed mi ne povis ne iri, mi tamen devis paroli kun li. Mi ne intencis peti helpon, kvankam tiel malriĉa mi estis tro fiero por fari tion; sed bonan konsilon mi tamen rajtus peti de tiu, kiun mi fidele servis dum dekkvin jaroj de mia vivo. Mi nun rakontis al li, kiel Björn jam de la komenco kondutis al mi, sed mi ankaŭ ne kaŝis, kiel mi agis al li.

Anders diris nenium vorton kontraŭ mi sed konsentis kaj opiniis, ke Björn estas fripono kaj sangosuĉanto. Mi ricevis kaj konsilon kaj helpon — mi ricevis prunte de li kvindek talerojn por aĉeti novan bovinon. La monon mi repagu per dek taleroj jare. Renton li ne volis havi.

Jen mi denove estis viro. La fortoj baldaŭ revenis, kaj mi povis prizorgi kaj mian propran teron kaj la taglaborojn. La sola, kio mia premis, estis tio, ke mi ĉiam devis penadi por mia plej granda malamiko, ĉar tia li estis. Kiam mi nur ekvidis lin, kvazaŭ pafotrailis mian korpon, kaj miaj manoj pugnigis, eĉ se mi tenis en ili la donojn de Dio. — Ni ja estus povintaj forlasi lin kaj preni alian farmbieneton, sed ni sciis, ke estas malfacile ricevi

alian; kaj estus malfacile forlasi la malnovan post bona prizorgo de la tero.

La sekvantan jaron Björn volis fari novkulturejon en la arbaro. Vere li ne volis tuŝi sian arbaron pli ol sian okulon kaj neniam li ricevis sufiĉan pagon por siaj ŝtipoj, kiam la suduloj venis tien ĉi por aĉeti iom da brulligno. Sed li intencis gajni tiom per tiu novkulturado. Antaŭ ĉio li kompreneble ricevus pli da kulturteroj, kaj krome li vendus la lignon kaj arbosuprojn kaj branĉojn kaj postulus bonan pagon; krome li prenis por si lignon por nova bovininstalo. Certe tio estis prudente elkalkulita.

Nun ni farmistoj devis penaĉi pli ol iam antaŭe. Björn preskaŭ perdis prudenton — neniam li povis elpremi kontentige da laboro el ni. Kiom ajn frue ni venis en la mateno, li tamen estis antaŭ ni en la arbaro kaj akceptis nin per pikvortoj aŭ blasfemoj, ĉar ni ne venas ĝustatempe, kaj neniam ni forlasis la lokon antaŭ ol la malumo malebligis hakadon.

Nu, en la vintro ni hakis la trunkojn, kaj printempe ni komencis forhaki radikojn kaj pioĉi.

Kelkajn tagojn antaŭ somermezo ni komencis bruligi la restaĵon. Estis forta sunlumo kaj bona vento dum longa tempo antaŭe, kaj herbaĵo, arbostumpoj kaj branĉetoj estis sekaj kiel tindro. Ni ekbruligis, kaj la unuan nokton Björn mem kuŝis kun ni en la arbaro kaj gardis la fajron — same la duan. Sed la trian, estis la Johano-festa vespero, li restis hejme kaj ordonis al mi kaj Johannes en Kasen gardi la fajron.

Nu, jen ni kuŝis tie ĉe la rando de la arbaro, Johannes kaj mi, kaj tiam en la vespero rigardis la fajramasetojn kaj flaris la odoron de la herbaĵfumo. Ni elprenis niajn pipojn kaj fumis, ĉar ion bonan ni tamen volis havi, kiam ni kuŝis tie. Björn ne donis al ni eĉ boteleton da brando por vigligi nin dum la nokto.

Kiam ni kuŝis tie, mi diris, ĉar ni memoras ĉiun vorton, kiun ni diris, kvazaŭ estus hieraŭ:

— Jen, Johannes, mi diris, vi kaj mi, ni tamen havas la diablon mem kiel mastron.

Johannes kapklinis.

— Jes, mi diris, li tamen estus povinta regali nin per boteleto da brando, se li volus esti kiel aliaj homoj, kiam li igas nin kuŝi tie ĉi eĉ en la Johanonokto por gardi.

— Ha, diris Johannes, pri tio mi ne estus pensinta, se vi ne estus dirinta tion. Ha, Björn regali nin per brando! Ha, ha! Kiel vi povis pensi ion tiel freneze stultan! Mia makzelo preskaŭ elartikiĝas pro rido.

— Jen vi ridas! mi diris. Sed mi, mi kraĉas.

— Nu, Lars, post tio ni prenos gluton da brando, diris Johannes kaj ridis ankoraŭ pli, kaj jen li tiris al si sian manĝoprovizon kaj elprenis boteleton kaj belan panon.

— Jen bonhavulo, kiu kunportas brandon, mi diris. Sed por vi estas ja eble akiri kaj tion kaj tion, vi ne havas infanojn, kiuj malfermas la buŝon al ĉio, kion vi povas akiri.

— Povas esti vere — sed kiom da fojoj mi deziris havi knabon, tiel mi almenaŭ havus iun por kiu penadi, diris Johannes, dum li tiris la korkon el la botelo kaj elverŝis al si.

— Jes, penadi por, diris mi. Ho, ho — penadi por ke la bienuloj havu novan sklavon post vi. Kaj tamen ili insultas. Ĉar ili insultas ja pro tio ke malriĉa kompatindulo venigas idojn en la mondon! Sed de kie ili prenis siajn sklavojn, se ni ne venigus ilin kaj kreskigus ilin?

— Jen! Prenu tiun ĉi kaj trankviligu vin per ĝi! diris Johannes kaj transdonis al mi brandon. Ne estu tiel plendema, li diris. Nia Sinjoro plej bone scias, kio utilas al ni. Se li donis al vi la infanojn, li donos ankaŭ ion por nutri ilin.

— Jes, se mi klopodas pli ol mi kapablas, mi diris. La Sinjoro donas nenion pro nenio.

— Ĉu li ne donas al vi sanon kaj forton por labori? diris Johannes.

— Jes, kompreneble, mi diris, sed kiel mi alie povus labori — alie la komunumo devus nutri kaj min kaj la infanojn.

— Preĝu al via kompatema Dio, ke li gardu vin de mal-kontento, ĝi estas la plej terura peko, kiu ekzistas, kaj naskas tiom da malbonaj pensoj, diris Johannes.

— Ho, certe nek boniĝos nek malboniĝos por mi, mi estu kontenta aŭ ne — kaj pensi tion, kion mi volas, tio tamen estas la plej malgranda rajto, kiun mi povas postuli, mi diris kaj redonis al li la glason.

Johannes ne respondis al tio sed foriris kaj ordigis kelkajn amasetojn, kiuj ne volis bone bruli. Poste li venis kaj kuŝiĝis apud mi, kun la kapo sur la brako. Post iom da tempo mi aŭdis, ke li ronkas. Li estis laca, li kiel mi — kaj li fidis min.

Sed mi kuŝis tie, kaj la pensoj turmentis. Mi ripetis ĉion malfacilan kaj malagrablan, kion mi travivis dum la ses jaroj sub Björn. Kiom li penigis min — premis min ĝis ekstremo, kiam mi pro lia kulpo kuŝis malsana kaj senforta; en la laboro ĉe li mi ja akiris mian malsanon. Ĉu li ne tiris min en la juĝejon kaj hontigis min? Se li estus povinta peli min el la hejmo, li estus tion farinta. Ĉu ne liakulpe la prokuroro prenis nian solan laktobovinan, prenis la laktogutojn el la buŝo de miaj mizeraĵ infanetoj! Pli kaj pli amara fariĝis mia animo. Mi forgesis eĉ tion, ke mi mem ne estas sen kulpo. — Fi, ke tia fripono rajtas vivi! mi pensis. Li havas en si ne pli da koro ol la fajro, kiu glutas ĉion, kion ĝi atingas.

Dume mi vidis, kiel la fajro flamas supren el stako malproksime ĉe la rando de la arbaro. Jen flamo transsaltis kaj iom lekis la crikon. Ekkraketis, kaj la eriko komencis bruli. Mi tuj volis kuri por sufoki la fajron, sed mi ne havis forton. Venis tia malbona penso — jen denove. "La ruĝa vulpo vivas ankoraŭ", mi diris. "Ruĝa vulpo, kuru — nun vi ne estas mia!" mi diris, mi apenaŭ povis deteni min de rido. "Ha, ha, nun mi estas pli potenca ol Björn mem, nun mi regas la tutan arbaron." —

Kraketis en la eriko, komencis sibli kaj kraki en la juniperoj — la flamoj saltis pluen kaj pluen. Mi estis kvazaŭ prudenton perdinta — mi kaŝis la kapon en la manoj. Mi sentis, kvazaŭ mi per unu fojo estus elĵetinta ĉion malfacilan kaj malagrablan, kion mi dum jaroj portis en mi. "Lasu! Lasu!" mi pensis. "Mi ne bezonas gardi — Johannes ja ne gardas. — Nun pereas la tegmentodorsoj, ha, ha! Ĉu vi ne volas havi dudekkvin talerojn por ĉiu, Björn? Prenu ilin, kara mastro!" — Turniĝis en mia kapo. Fine mi ne sciis, ĉu mi maldormas aŭ songas.

Tiam komencis kraki terure. Mi levis la rigardon. Kompatema Dio, kion mi faris! La fajro estis en la arbaro, brulis la arbosuproj. Mi leviĝis kiel frenezulo kaj kuris tien. La fajro iris en direkto al mia dometo. Mi tretis la brulantan erikon, mi kaptis branĉorican arbeton kaj sovaĝe frapis ĉirkaŭ mi en la fajron. Mi kuris pli kaj pli malproksimen inter la brulantaj arboj. Miaj manoj kaj piedoj bruldifektiĝis, miaj vestoj ekbrulis, la fumo preskaŭ sufokis min. Sed ankoraŭ mi frapis ĉirkaŭ mi. Fine ŝajnis al mi, ke venas granda flamo, granda kiel domo, kaj levas min supren en la aeron — estis tiel hele kaj tiel varme — kaj mi devis sekvi alten, alten, alten. Poste mi memoras nenion pli.

Kiam mi post longe retrovis konscion, mi kuŝis en la malsanulejo en Vänersborg. Mi provis moviĝi, sed tiel doloris en la tuta korpo, ke mi devis kuŝi tute senmova. Kaj nenion mi povis vidi, la okuloj bruldoloris kvazaŭ estus fajro en ili. Jen mi ekmemoris, kio okazis. Ho, kiom tio turmentis min, ŝajnis al mi ke mia tuta korpo volas turni la internon eksteren, tiel tio premis min. Mi deziris, ke mi estu morta.

Nu, la tempo pasis, kaj fine mi tiom resaniĝis, ke ili povis venigi min de la malsanulejo. Tiam mi estis tute blinda. Tio estis mia unua puno; sed ĝi ne estis la plej terura.

En la malsanulejo oni ne rakontis al mi, kio okazis, post kiam mi perdis la konscion meze en la fajro. Sed tion faris Anna Stina, kiam ŝi venis preni min hejmen.

Ankoraŭ mi ektemas, kiam mi pensas pri tio, kion ŝi rakontis. Johannes en Kasen vekigis kaj kuris post mi kaj trenis min el la fajro. Poste venis homoj el ĉiuj direktoj por helpi pri estingo. Sed ne estis eble. La arbaro estis seka kiel pulvo. Kaj okazis tie kiel ĉiam dum arbarfajro — se la aero estas kiom ajn kvietita, kiam komenciĝas la fajro, tamen ne daŭras longe, antaŭ ol vento estiĝas. Kaj la flamoj flugis de arbo al arbo, vasten, vasten kaj tre rapide en la seka arbaro. Ili provis forhaki kontraŭ la fajro, sed ĝi transflugis — ne estis eble bari ĝin. Miaj domoj kaj kvin aliaj farmlokoj forbrulis, kaj la homoj apenaŭ povis savi sin kaj la brutojn. Ili devis peli la brutojn en la lagojn, kaj la abeluojn kaj la malgrandaĵojn, kiujn ili havis en la domoj, ili devis meti en boatojn kaj elremi sur la lagon, kaj tie ili devis sidi kun infanoj kaj ĉio, ĝis la brulo finiĝis. Kaj lupoj, kiuj tiutempe abundis en la arbaro, fuĝis kaj kuris rekte en la domojn kaj al la homoj. Kaj la birdoj flugis ĉirkaŭ siaj nestoj kaj kriis, sed fumo kaj fajro forpelis ilin. Jes, dekkilometra arbaro forbrulis kun ĉio, kio estis en ĝi kaj ne povis fuĝi, kaj kvin malriĉaj familioj senhejmiĝis, kaj mi mem el labortaŭga, honesta homo fariĝis blinda aĉulo kaj ŝarĝo al la malriĉulprizorgo — nun la komunumo devas zorgi kaj pri mi kaj pri miaj infanoj, nun mi ne plu povas penadi por ili. Ho, kiel volonte mi penadus, jes, ĝissange penadus, se ĉio estus kiel antaŭe. — Sed mia plej terura puno estas tio, ke homvivo premas mian konsciencon, kaj kvankam estis la vivo de mia plej granda malamiko, tio tamen same multe turmentas min. Kiam la arbaro estis brulinta, Björn foriris kaj pendigis sin.

Tradukis *S. Engholm*

Komentoj

Rimarkigo pri "El ĉiuj popoloj" (MR nro 2/46)

"Neniu sin ĝenis, eĉ Papo en Rom',
nenu kontraŭis, protestis. —"

Pri la vero de tiu aserto juĝos historio; jen kelkaj —
nekompletaj — faktoj:

En parolado al la kardinaloj la 21an de decembro 1942
la Papo diris i. a., ke memorante tion, kion li dum la
antaŭa milito povis mem fari en la nomo de Benedikto XV
por malpezigi la suferojn de multaj kaptitoj, li esperas,
ke ankaŭ tiun ĉi fojon la vojo restos nobarita por religiaj
kaj filantropiaj iniciatoj de la Eklezio. Sed en certaj
landoj realigo de lia projekto estas malebligata. Tamen
la papo ĝojis, ke li povis atingi almenaŭ parton de la kap-
titoj... kaj grandan nombron da rifugiintoj, ekzilitoj,
migrantoj, *speciale inter nearjoj*.*

En deklaro de la 2a de junio 1943 li esprimis sian pro-
fundan doloron antaŭ la angoraj petegoj de ĉiuj, kiuj pro
sia raso aŭ naciĉo estas premegataj de la plej grandaj
afliktoj, de la plej akraj doloroj, kaj sen persona kulpo
destinitaj eĉ al ekstermado.

En Nederlando la tre populariĝinta kolektado por "spe-
cialaj bezonoj" de la episkoparo havis sian originon en
ekleziia monokolekto, ordonita de la episkopoj la 29an de
junio 1941, por helpi la *judojn* en ilia akra mizero. Ĉar
ekzistis danĝero, ke la germanoj povos konfiski la rice-
votan monon, se ili malkovros la celon, oni donis al tiu
monokolekto la ĝeneralan nomon "Kolektado por la spe-
cialaj bezonoj de la episkoparo". En la komenco tio vekis
iom da miro eĉ la paroĥestroj, ĉar ĝis tiam oni ĉiam
konigis la celon de kolektadoj.

En 1941 la nederlanda episkoparo sciigis al la depar-
tamento de edukado kaj al la lernejestroj, ke oni neniam

* Arĝo. Ano de hindeŭropa raso.

permesos forigon, pro juda deveno, de baptitaj infanoj.
En malsanulejoj, bibliotekoj ktp. oni ne toleris tabuletojn
kun inskribo: "Malpermesite al judoj".

La 11an de julio 1942 la katolika episkoparo, kun aliaj
eklezioj, sendis tiun ĉi telegramon al la okupantoj: "La
sube cititaj nederlandaj eklezioj, jam profunde impresitaj
pro la disponoj kontraŭ la judoj en Nederlando, per kiuj
oni ekskludas ilin de partopreno en normala popola vivo,
ekscelis kun teruro la novajn decidojn, laŭ kiuj viroj, vi-
rinoj, infanoj kaj tutaj familioj estas forkondukataj al
germanaj teritorio kaj dependaĵoj. La sufero, kiun tio
kaŭzas al dekmiloj, la scio ke tiuj aranĝoj kontraŭas la
plej profundan moralan konsecon de la nederlanda popolo,
kaj precipe la kontraŭeco de tiuj disponoj al kompato
kaj justo, postulataj de Dio, instigas la ekleziojn direkti
al vi plej urĝan peton ne plenumigi tiujn decidojn.

Por la kristanoj inter la judoj nia insista peto estas
plue inspirita de la konsidero, ke per tiuj disponoj oni
malebligas al ili partoprenon en eklezia vivo."

Tiu telegramo havis kiel sekvon almenaŭ la promeson,
ke kristanaj judoj ne estos forkondukataj, se ili apartenis
al kristana eklezio antaŭ januaro 1941.

La 17an de februaro 1943 la protestantaj eklezioj kaj
la katolika eklezio memorigis al la okupantoj i. a.:

1. la kreskantan mankon de justeco,
2. la ĝismortan persekuton de la judaj civitanoj...
7. la mortigon de garantiuloj... kpt.

"La eklezioj predikas kontraŭ la malamo kaj venĝemo
en la menso de nia popolo kaj kontraŭ manifestado de
tiuj sentoj. Laŭ Dia leĝo neniu povas esti sia propra
juĝo. Sed ili havas la mision prediki ankaŭ tiun ĉi parolon
de Dio: Vi obeu al Dio prefere ol al homoj. Tiu parolo
validas kiel kondutregulo en ĉiuj konfliktoj de la kon-
scienco. Pro amo al Dia leĝo neniu povas kunlabori en
maljustaj agadoj, ĉar farante tion oni kulpiĝas pri tiu
maljustaĵo."

Oni provis, sed parte sen sukceso, igi la policianojn rifuzi kunlaboron al tiaj ordonoj.

En Francujo, la 22an de julio 1942, la kardinaloj kaj ĉefepiskopoj de la okupita regiono protestis en letero al Marŝalo Petain kontraŭ la arestado kaj la senkompata traktado de la judoj.

La 23an de aŭgusto 1942 letero de Monsignore Saliège, ĉefepiskopo de Toulouse, memorigis ke "la judoj estas homoj". Ekzistas homa moralo, apogita sur la naturo de la homo. Tiuj devoj kaj rajtoj venas de Dio; neniu povas forigi ilin.

La 30an de aŭgusto Monsignore Theas, episkopo de Montauban, aŭdigis "indignan proteston de la kristana konscienco, proklamante ke ĉiuj homoj, ĉu arjoj ĉu nearjoj, estas fratoj, ĉar kreitaj de Dio; ke ĉiuj homoj, kiu ajn estu ilia raso aŭ religio, havas rajton de respekto de individuoj kaj ŝtatoj.

La 29an de decembro 1940 la Granda Rabeno de Belgujo skribis al kardinala moŝto Van Roey, ĉefepiskopo de Mecheln:

"Mi petas, ke via eminenco* bonvolu akcepti miajn tre sincerajn dankesprimojn pro la klopodoj, kiujn via eminenco bonvolis fari favore al la personoj trafitaj de la lastaj ordonoj pri forpelado en Antverpeno..."

La 4an de aŭgusto 1942 la belga kardinalo skribis al kardinalo Maglione: "Nuntempe la traktado de la judoj estas vere nehumana kaj vekas ĝeneralajn kompaton kaj indignon; eĉ la katolikoj de juda deveno submetiĝas al tiuj disonoj. Mi provis havigi mildigojn sed malfeliĉe ne ricevis."

La 12an de aŭgusto 1942 la Centra Juda Konsistorio de Belgujo skribis al kardinalo Van Roey: "Kun emocio la C. J. K. de Belgujo permesas al si diri sian profundan dankemon pro la bonvolo kaj simpatio montritaj de via eminenco, okaze de la penigaj elprovoj, kiujn la judoj de nia kara lando nuntempe suferas..."

* Titolo de kardinalo.

La Granda Rabeno de Belgujo, Sro Ullman, malliberigita en septembro 1942, ellasita dank' al interveno de la kardinalo, denove arestita la 24an de aŭgusto 1944, definitive liberiĝis la 4an de septembro je la alveno de la angla armeo. Tuj li persone vizitis la ĉefepiskopejon por danki la kardinalon, ankaŭ en la nomo de aliaj, fratece akceptitaj en la monaĥinejo de Mecheln kaj en la granda pastra seminario.

Dum la milito multaj monaĥicjoj, kolegioj ktp. kaŝis judajn infanojn; oni oficiale scias pri pli ol mil nur en la eparkio de Mecheln; sed verŝajne estis multe pli. Iun tagon estrino de monaĥinejo en Bruselo, kie loĝis dekduo da tiaj infanoj, ricevis viziton de gestapo, kiu postulis tujan transdonon de la infanoj. Ŝi havigis prokraston ĝis la sekvanta mateno, "por prepari la pakaĵojn". Dum la nokto grupo de armitaj rezistuloj perforte eniris la domon, ŝtelis la infanojn kaj tiel savis ilin.

J. De Maeyer, Nivelles, Belgujo.

Ni estas tro malgrandaj

Mi volas iom skribi pri verecaj sonĝoj. Por tio mi havas kvin kaŭzojn: Justesen, Heilskov, Dunne, mi mem kaj — nevenkebla skribemo.

En la artikolo "Mi kaj mia helpanto" (MR 1/46) Justesen prezentas "helpanton" kiu estas en li mem, en lia subkonscio. La helpanto donas informojn pri okazaĵoj estontaj, havas tentaklojn etenditajn en mondon por ni ankoraŭ fermitan. La helpanto estas en la subkonscio, sed ankaŭ konscienco li estas nomata.

"La enigmo de la tempo" estas titolo de mistika artikolo de Heilskov (MR 3/46). Li tie detale priskribas sonĝon, kiu post unu jaro realiĝis laŭ ĉiuj detaloj.

Angla inĝeniero Dunne, konstruisto de aeroplanoj, eldonis libron kun la titolo Eksperimento pri la tempo

(angle: An experiment with time, la sveda eldono: Experiment med tiden). Li donas multajn ekzemplojn pri sonĝoj kiujn li havis, kaj kiuj poste realiĝis. Li ne trovas ion "supernaturan" en tio, sed provas doni sciencan klarigon laŭ matematika maniero. Por li ne nur spaco sed ankaŭ tempo estas multdimensia, kaj la ordinara tempo estas tempo de unua dimensio. Post tiu sin kaŝas senfina serio da tempoj laŭ ĉiam pli alta dimensio. En sendorma stato la homa menso sin movas nur en la tempo de unua dimensio, sed en la dormo la animo sukcesas "veturi" en tempo, kaj reen al la pasinto kaj antaŭen en la estonton. Ambaŭ okazas same ofte laŭ li.

Li priskribas ankaŭ metodon de sincera kaj senkondiĉa esploro pri la afero. Helpiloj estas notlibro ĉe la lito kaj memkonkero por sin rapide tiri el la vuala sonĝomondo. Kiam oni vekigaŝas oni devas senprokraste noti ĉiun detalon de la ĵus spertita sonĝo, ĉar alie ĝi estos baldaŭ forviŝita el la "ekrano" de la cerbo. Poste oni povas konstati ĉu la sonĝo korespondas kun okazaĵo estiinta aŭ estonta. Sed nur se oni havas la notojn oni povas ion efektive pruvi, ĉar alie la memoro povas nin trompi. Multaj el ni certe iam havis la strangan senton ke "ĉi tion mi travivis jam iufoje" laŭ ĉiuj detaloj.

Leginte la katenantan libron mi ĉeestis prelegon pri la temo "Vizaĝoj de la urboj". Kiam mi atendis alvenon de la preleganto mi havis neniun alian por fari ol cerbumi pri la libro. Mi pensis: "Nun mi provu liajn teoriojn! Imagu: Kion mi vidus sur la lumbildoj montrotaj?" Mi fermis la okulon kaj vidis en strato tian grandan horloĝon kia kutimas pendi ekster butikoj de horloĝisto. Ĝi indikis kvin minutojn antaŭ la sepa aŭ oka. Mi ne povis klare distingi kion la hormontrolo indikis, sed devis esti la sepa aŭ oka. Dum la prelego poste unu bildo montris precize similan horloĝon, kaj ĝi montris kvin minutojn antaŭ la sepa!

Se tio estis nur hazardo ĝi signifis vere strangan koincidon. Mi ne estas superstiĉa sed ĉiujn antaŭjuĝojn mi

provas venki. La homa cerbo perceptas nur parton de la realo, kaj pri la cetero ni povas konstrui nur difuzan kaj necertan koncepton, kiun ni foje devas ŝanĝi laŭ la spertoj. La sciencistoj ja plejparte forlasis la "materialisman" mondkoncepton, laŭ kiu oni kredis je nur mekanikaj leĝoj kaj konsideris la universon grandega maŝino. Kiu konstruis la maŝinon tamen ankaŭ por la "materialistoj" restis nesolvebla enigmo. Ĉu niaj nepoj vivos en mondo kie oni konsideros ebla rigardi en la estonton? La mondkonstruaĵo ŝanceliĝas je la imago. La problemoj grave koncernas la rivalecon inter libera volo kaj antaŭdestino. Ni estas tro malgrandaj.

Salex

La enigmo de la tempo

Kun granda intereso mi legis la artikolon en M. R. nro. 3 de Chr. Heilskov, sub la supra titolo. Sro H. lasis la klarigon de sia travivaĵo al la legantoj.

Nu, mi ne intencas doni sciencan klarigon pri tio, ĉar laŭ mia opinio la tekniko tiurilate ne sufiĉe multe progresis por science esplori tiajn aferojn. Ni povas nur konstati la faktojn, kaj la konstato ja estas pruvo.

La donita rakonto ne estas la ununura en sia speco. Multaj tiaj ekzemploj estas jam konataj. La animo kapablas transloki sin en ĉiun lokon kaj en ĉiun tempon. Tempolimo kaj spacolimo ja ne ekzistas.

Sonĝo estas travivaĵo de la animo (nomu ĝin "subkonscio"). En la dormo ĝi forlasis la fizikan korpon kaj vere estas en aliaj lokoj. Aŭ, restante en la korpo, ĝi vidas tion, kio estas ĉirkaŭ ĝi.

Estas konata afero, ke ofte mortantoj anime jam eniris la alian mondon sed fizike ankoraŭ vegetas.

Konatinio mia antaŭ la morto jam vivis en la spirita mondo kaj vidis la ĉirkaŭon, kie ŝi supozeble plu vivos. Dum tiu tempo la korpo estis kvazaŭ senkonscia. Kelk-

foje reveninte en la fizikan korpon la konatino rakontis, kion ŝi spertis kaj ŝi konsciis pri tio, ke ŝia animo ankoraŭ ne kapablis malligiĝi de la fizika korpo.

Pli impresan pruvon mi spertis antaŭ nelonge. Mi estis vespere ĉe iu, kiu kapablas vidi per spirantaj okuloj. Iun momenton ŝi diris: "Mi vidas sinjorinon A. Ŝi estas ĉi tie en la ĉambro." Tiu sinjorino gastloĝis ĉe parencoj en alia urbo pli ol cent kilometrojn for de ni. Kaj jen post unu tago ni ricevis leteron de s-ino A. en kiu ŝi skribis: "dimanĉevespere mi estis anime ĉe vi, kaj mi vidis vin en la ĉambro."

Ne nur la mortantoj forlasas la fizikan korpon, sed ankaŭ la vivantoj kelkfoje vagas en la alia mondo.

Kaj mi same ne diskutu ĉi tie, ĉu la animo tiam estas en liberigita stato sur la fizika maro aŭ tero, aŭ ĉu ĝi vidas la astralan kopion de la fizika.

Fakto estas nur, ke ni konstatas tiajn travivaĵojn, kaj ili estas instigo pli profunde pripensi la problemojn pri vivo kaj morto.

J. van Scheepen

Literaturo

Jef Last: La hispana tragedio. Eld: Federacio de laboristaj esperantistoj (Ned.)

La libro temas pri la milito en Hispanujo, la antaŭludo de la dua mondmilito. Ĝi konsistas el enkonduko, kiu bone resumas la tiaman situacion en Hispanujo, kaj el leterformaj skizoj, kiuj ampleksas la tempon de okt. 1936 ĝis nov. 1937. La aŭtoro estas nederlandano kaj partoprenis la militon kiel volontulo (kompreneble sur la registara, kontraŭfaŝista flanko). Li estis oficiro. Cetere mi konas nenion pri li, sed en la leteroj li okaze prezentas sin kiel verkiston kaj ankaŭ pedagogon.

Jam antaŭ la granda milito aperis tiu libro. Ĉu ĝi ankoraŭ estas leginda? Mi opinias ke jes, kaj mi kuraĝas eĉ rekomendi ĝin. La aŭtoro neniam oratoras, neniam uzas grandajn vortojn kaj fortajn sentesprimojn. Estas simplaj rakontoj de la fronto kaj aliaj lokoj, ne multe de rekta militpriskribo. Ili faras impreson, kiel ĉiam faras simplaj realofidelaj rakontoj, oni pensas pri ili, memoras ilin kaj longe post la legado denove pensas pri li. Estas homaj sortoj kaj homaj problemoj, kies enhavo koncernas ankaŭ nin. La aŭtoro prezentas al ni ankaŭ spirite tre evoluintajn homojn, ideojn, entuziasmon, atmosferon de nova evoluo, rapidajn superrigardojn de la socirlata pensomondo.

La hispana tragedio estas nesolvita. Nesolvita estas la universala tragedio de subpremo de homoj al homoj kaj de ŝtatoj al ŝtatoj. Kion fari kaj kiel agi por solvi ĝin? Neniu libro donas praktike kontentigan respondon pri tio. La libro de Jef Last igas nin pensi pri la problemo, pense prilabori ĝin. Tiu merito sufiĉas por fari libron leginda.

G. J. Degenkamp faris la tradukon. Ĝi estas farita kun lingva konscio, kun lingva respondosento, sekve estas bona laboro. Troviĝas kelkaj diskuteblaj esprimoj, kaj certaj vortoj kaj vortkonstruoj verŝajne ne plaĉas al ĉiuj, sed tio estas apuda afero.

La libro ampleksas 187 grandajn paĝojn. Preso kaj papero estas bonaj.

S. E.

Henry Drummond: Kvin paroladoj. Eldonita 1935 de F. H. Ilanbury, Romford, Anglujo. Havebla de la libroservo de IEL, prezo 2 ŝ.

Henry Drummond naskiĝis 1851 kaj mortis 1897. Li estis naturscienca prelegisto en Glasgovo kaj poste profesoro en teologio en la sama urbo. La paroladoj aperis en la jaroj 1890—1893, kaj ili temas pri la instruo de Jesuo.

Mi ne scias, ĉu tiuj paroladoj estas ĝenerale konataj kaj legataj en Britujo. Mi supozas, ke ne. Alie ili devus esti pli konataj ankaŭ en la cetera mondo. Ŝajnas preskaŭ enigmo, ke tiuj paroladoj restis esence neatentataj kaj sen ĝenerala influo. Supozeble la kaŭzo estas, ke oni ne komprenis ilian profundan enhavon.

En 1893 Vivekananda, tiu grandioza, universala interpretanto de hinduismo kaj religio ĝenerale, komencis sian agadon per siaj paroladoj en World's Parliament of Religions en Ĉikago. Sed jam tri jarojn pli frue Henry Drummond faris la unuajn el tiuj kvin paroladoj, kiuj rilate al interpreto de la instruo de Kristo ŝajnas al mi same gravaj kiel tiuj de Vivekananda rilate al hinduismo kaj religio ĝenerale. Pli bonan prezenton de la esencaj aferoj en la instruo de Jesuo mi neniam vidis.

Mi nepre rekomendas tiun libron, al kredantoj kaj nekredantoj, al kristanoj kaj ne-kristanoj. Tiel grandaj pensoj devas ne resti dormantaj en libro.

La lingvo estas bona, simpla, klara. La preso estas, almenaŭ en mia ekzemplero, parte ne klara.

S. E.

La preĝo de nia sinjoro. Signifoklarigo de Henry Thomas Hamblin. Prezo 6 pencoj.

Eldonita de F. W. Hipsley, 17 Abbot's Road, Birmingham, 14.

Havebla de British Esperanto Association, 140 Holland Park Avenue, London W. 11.

Malgranda bela kajereto kun enhavo laŭ la subtitolo. De la sama aŭtoro aperis miniaturaj kajeretoj: Klarigaj vortoj pri pensologio. Serio de 12 tiaj kajeretoj kontraŭ 4 respondkuponoj; mendeblaj ĉe la supre nomita eldonanto, F. W. Hipsley.

Fáy András: Elektitaj fabeloj. Prezo 4 int. respondkuponoj. Eld. Szalay, Esperanta libroeldonejo, Esperanto-strato 39, Budapeŝt VIII.

Fabeloj de fama hungara "fabelisto, kiu fabelis por plenaĝuloj". La verko estis preta por ekspedo, kiam eksplodis la dua mondmilito. Nun fine ebligis al la eldonanto transdoni la verketon al la tutmonda esperantistaro.

Bela volumeto 32paĝa, la paĝoj ornamitaj per ruĝaj girlandoj. Pro la simpla lingvo ĝi ŝajnas bona legaĵo por komencantoj; pro la bona enhavo valora ankaŭ por aliaj.

La organizo de la 32a Universala Kongreso de Esperanto 1947 en Bern

La Loka Kongresa Komitato en Bern komunikas:

Ni supozas ke la Esperantista popolo kun kontenteco akceptis la novaĵojn, ke nia unua postmilita kongreso denove okazos en Bern, ĉar oni memoras ke la lasta kongreso kiu okazis en la sama urbo estis bona sukceso, kaj ĉar el ĉiuj landoj la homoj nuntempe kun granda plezuro vojaĝas al Svislando. La kongreso do okazos de la 26-a de Julio ĝis la 2-a de Augusto 1947. La kongresejo jam estas luita, ĝi estos la sama kiel lastfoje, kiam ĝi pruvigis kiel tre taŭga kaj plaĉa. La Loka Kongresa Komitato estas organizita kaj komencis siajn laborojn jam en Aŭgusto. Ĝin prezidas denove s-ro H. Buchli, direktoro de la trafikoficejo en Bern, kiel unua sekretario funkcias s-ro O. T. Nicolaisen, norvego, kiu speciale venis al Bern por dediĉi sin al tiu laboro, la financojn estras denove s-ro Hilfiker, kiu ankaŭ en 1939 gvidis la kongresan monkeston sukcese tra ĉiuj danĝeroj, la presan servon transprenis d-ro A. Bauer, kiu ankaŭ povas profiti de la sportoj faritaj la lastan fojon. Pluraj aliaj fakuloj kompletigas la organizan komitaton.

La kongreskotizoj estas fiksataj de IEF. Ili estas (en svisaj frankoj) 25 ĝis la fino de la jaro, 30 ĝis la fino de Marto, kaj 35 poste. Por edzinoj kaj junuloj estas malaltigitaj kotizoj. Do, baldaŭa aliĝo estas avantaĝo, sed ne pro la malpli alta kotizo, sed en la nunaj kondiĉoj ĝi estas utila, ĉe necesa pro diversaj kaŭzoj. Jam en 1946 la fremdula trafiko al Svislando estis tre vigla, sed

en 1947 ĝi estos ankoraŭ multe pli granda, tion oni jam nun laŭ hotelmendoj k. t. p. scias tre ekzakte. Per frua mendo kaj pago la kongresanoj ebligas al la LKK fikse rezervigi la hotelĉambrojn, kaj ankaŭ la specialajn vagonarojn, ekskursautojn k. s. La LKK disponas pri kelkaj cent hotelaj litoj, pri kelkaj cent ĉambroj ĉe privatuloj, krome ĝi havigos al si litojn en lernejoj aŭ kazernoj, tiel ke ĉiu kongresano laŭ siaj propraj cirkonstancoj povos elekti, kio konvenas al li aŭ ŝi. La informilo pri la hoteloj estas en preparo kaj se eble jam en Oktobro ĝi estos dissendata. Same pri la ekskursoj, kiuj kun la aprobita kongres-programo tiam estos diskonigataj. Tiam necesos ke la kongresanoj tuj mendu kaj transpagu la sumon pro kongresaliĝoj, loĝado kaj manĝado, kaj ekskursoj, ĉio kune. Ĉiu transpago estu farota al iu banko per la konto de la 32- Universala Kongreso de Esperanto 1947 en Bern per la Schweiz. Volksbank en Bern. Ni sciligas al la landaj asocioj la diverslandajn listojn de bankoj kiuj kunlaboras kun la Schweiz. Volksbank. La landaj asocioj ankaŭ disponas pri aliĝiloj por la kongreso. La eksterlandaj svisaj trafikagentejoj volonte donos informojn pri la vojaĝeblecoj.

En la komenco de Novembro aperos la unua numero de nia kongresa gazeto "Svislando vokas vin". Havigu ĝin al vi skribante al 32-a Universala Kongreso de Esperanto, Bundesgasse 20, en Bern; ĝi enhavos utilajn informojn por ĉiuj vojaĝantoj kaj cetere aperos regule ĝis la kongreso.

Tiuj unuaj sciigoj certigu al la Esperantistaro, ke la preparaj laboroj jam antaŭeniĝis bonan pecon de la vojo. Venu multnombre al la gastama urbo de Bern en bela Svislando por la unua postmilita renkontiĝo de nia verda familio!